

1978 aprilo

71-a jaro

n-ro 868 (4)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — nl-3015 bj rotterdam — nederlando



Bulgario:
Profunde en la nekonata oriento?

Vi trovos

ke ni ankoraŭ atendas viajn reagojn al tiu 32-paĝa marta numero, kiu ne estus devinta lasi vin silenta kaj senreaga aŭ senaga. Ne skribu al ni demandante, kiam ni denove produktos 32-paĝan revuon. Prefere skribu: 'Mi varbis tri duonpaĝajn anoncojn kaj esperas, ke tio helpas baldaŭ ampleksigi la revuon'. Ho jes! Ĉu vi eble bezonas nian detalan anonctarifon, kun ĉiuj indikoj pri la teknikaj kondiĉoj de anoncado? Faru nur klaran okulsignon al ni pri tio, kaj ni tuj liveros la informilon. Nu, ĉio ĉi povus al vi ŝajni ia gaja redakcia umaĵo, sed la vero estas, ke nur multnombraj anoncoj aŭ 50-procenta kresko de la abonantaro povus certigi definitivan, t.e. konstantan pliampleksigon de la revuo. Se vi ne provos varbi anoncon, vi certe ne sukcesos sed, se vi ja provos, povus okazi, ke sukceso estos rezulto de viaj provoj kaj klopodoj.

Kiam vi foje skribas al la redakcio, faru penon ne tro multe ridigi nin, ĉar, se ni multe ridos, simple ne restos tempo produkti la revuon ĝustatempe. Eble la malfrueto de ĉi tiu numero parte ŝuldiĝas al germana leganto, kiu sian leteron antaŭ kelkaj tagoj komencis per 'Karaj geredakcianoj'. Ĉu oni vere ankoraŭ imagas, ke "ni" estas ia redakcia taĉmento, konsistanta el minimume deko da homoj, el kiuj unu verkas, alia serĉas trafajn ilustraĵojn, tria ludas per projektoj de la teknika aspekto de la koncerna paĝo, plia finredaktas la tekston, kvina kompostas ĝin, iu aldonas provlegas, sepa enpaĝigas, kroma fotografas, naŭa muntas la ofsetajn filmojn, kaj la lasta kontrolas ĉion, aprobas kaj sendas al la presisto. Ho, kiel bele estus, se ni havus tiel multe da helpantoj. Notu, tamen, ke provizore ankaŭ nun, kiel en la sepdek antaŭaj jaroj de ĉi tiu revuo, "redakcio" ekzistas nur teorie, ĉar la tutan revulaboron faras pli-malpli du homoj, krom aŭ inter siaj aliaj oficejaj taskoj. Dankon do, nome de la "redakcio", pro la pacienco finlegi ĉi tiujn tedajn liniojn!

Enhavo

- 69 Afriko: Kontinento kie ni mankas (S. Milojević)
- 70 Antaŭ sepdek jaroj (El leteroj de H. Bolingbroke Mudie al H. Hodler en 1908); okaze de la 70a datreveno de la fondiĝo de UEA
- 71 Ĉi-jara kongreslando: Ĉiu mila loĝanto esperantisto (S. Milojević)
- 74 La iama Bulgario: Tri virinoj rakontas . . . (Julie Tonkin)
- 77 Informado: Multaj anonimaj uzantoj kunkreis la lingvon (Claude Piron)
- 79 Recenzoj ("La granda kaldrono", "Eseo pri Ido", "Frithjof-sagao", "De tempo al tempo", "Ribela saĝo")
- 81 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 82 TEJO-paĝo: La urbo de la 34a TEJO-Kongreso: Iama metropolo, Du multnombraj renkontiĝoj: Epe antaŭ Jezolo
- 83 Kongresa Komunikado (novaĵoj pri la 63a Universala Kongreso en Varno)
- 84 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 86 Nekrologoj (P. Castellvi de Heider, J. Isakov, I. Israeli, Mario Pei, H. Tobusch, H. Westenberger), Oficiala informilo
- 87 Ekzameno E (Bernard Golden)
- 88 Anoncetoj

La kovrilo

La monaĥejo Rila, tiu arkitektura gemo "perdita" en la verdo-marĝo de la montara ĉeno Rodopi, ie en la meza sudo de la ĉi-jara kongreslando Bulgario. Rila staras tie preskaŭ mil jarojn. Ĝi ŝanĝis amason da regantoj, sed ĝi mem ne multe ŝanĝiĝis. Jes eble rilate sian aspekton, ĉar ĉiu volis ion aldoni al la jam palace pompa monaĥeja komplekso. Ĝi ne ŝanĝiĝis spirite, ĉar ĝi tra ĉiuj ĉi jarcentoj restis la fajrujo de la naciaj integreco kaj identeco de la lando, kies gastoj estos miloj da esperantistoj fine de julio kaj komence de aŭgusto ĉi-jare. La rozo sur la kovrilo volus simple diri: Koran bonvenon al Bulgario!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estrararo de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Miłanówek, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.

AFRIKO:

Kontinento kie ni mankas

AFRIKO, kontinento spertanta la plej grandajn lingvo-problemojn nuntempe, apenaŭ konatiĝis kun la Internacia Lingvo. En sia 90-jara historio Esperanto ankoraŭ ne sukcesis enradikiĝi ie ajn en Afriko, kun eventuala escepto de Madagaskaro, de kie foje venas kontraŭdiraj informoj kaj helpopetoj. Tie fine de marto ĉi-jare devus kunsidi kvar estraranoj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Dum aprilo, al Eŭropo venos du funkciuloj de la Esperanto-movado en Madagaskaro. UEA eluzas tiun okazon kaj invitis ilin veni al Roterdamo, por diskuti la problemojn de la landa organizaĵo, kiu iam estis aliĝinta al la Asocio.

D-ro Renato Corsetti, kiu gvidas la t.n. Regionan Agadon de UEA, dum la lastaj jaroj starigis plurajn skribajn kontaktojn kun izolitaj esperantistoj kaj interesitoj en Afriko. Antaŭ kelkaj jaroj, japanino (nun vivanta en Norvegio) Tamiko Kawakami vojaĝis tra Afriko kaj faris plurajn publikajn elpaŝojn pri Esperanto (radio, gazetaro), sed tio restis sen eĥoj, ĉar sekvis neniam organizita laboro por nutri la eventuale vekitan intereson pri la Internacia Lingvo. Simile okazis pri "Karavano de Amikeco", kiun en 1962 tra Afriko gvidis Tibor Sekelj. Ankaŭ ĝi atentigis pri Esperanto, sed tio restis nur atentigo. Samjare UEA aperigis franclingvan kaj anglalingvan eldonojn de la broŝuro de T. Sekelj *Komuna lingvo por Afriko*, de kiu ankoraŭ nun restas pli ol mil nedistribuitaj ekzempleroj. Ankaŭ d-ro Corsetti verkis broŝuron pri Esperanto por Afriko. Antaŭ deko da jaroj, maliano Ibrahim Tambura kutime estis la sola afrikano en la Universalaj Kongresoj. Nun tiun rolon komencas transpreni burundiano

Justin Minani. Kiam li ne venas, ni havas niajn d-rojn Isaac kaj Megalli, egiptojn, kiuj jardekojn longe vivas en Eŭropo. Se ni ankoraŭ mencias la movadeton en Sud-Afriko, tio devus esti la pli granda parto de ĉio pri Esperanto en Afriko dum la lastaj jardekoj.



La "reĝo Parzival" sur sia biciklo kun kromveturilo en kiu trenas tra Afriko la reputacion de la Internacia Lingvo.

Tamen, plia, eĉ freŝdata, klopodo disvastigi la Internacian Lingvon en Afriko restis ĉi tie ne menciita. Ĉu vi memoras nian amaran komenton (v. la numeron de marto 1977, p.49) pri la konfuzo, kiun komence de la pasinta jaro kreis en kelkaj okcidenteŭropaj landoj sviso Serge Reverdin aŭ "reĝo Parzival", kiel li mem titolas sin? S-ro Reverdin, kun la tuta kvanto de siaj nekombitaj ideoj pri la monda frateco kaj Esperanto, per sia biciklo, jam preskaŭ jaron kaj duono vagas tra Afriko kaj "propagandas" la Internacian Lingvon. Li jam estis en Alĝerio, Tunizio, Niĝerlando, Voltalando kaj Ebura Bordo. Oni ja intervjuas lin ĉie, ĉar tra-bicikli Saharon estas minimume heroaĵo. Li ankaŭ instruas ĉie, iom la bahaismon, iom Esperanton. En Abiĝano, ĉefurbo de Ebura Bordo, la "reĝo" eĉ fondis Esperanto-klubon. Raportis pri ĝi ankaŭ loka gazetaro, kiu parolis pri trideko da membroj, kiuj "lernis la tutan gramatikon de la lingvo en du horoj".

Hazarde, sur la sama gazetfolia peco (sendita al ni de s-ro Reverdin), kie aperis la artikolo "Esperanto: Klubo fondita en Abiĝano", aperas ankaŭ artikolo de J.M. Souza, studento. Lia artikolo titoliĝas "La avantaĝoj de la instruado de niaj lingvoj". Ĝi traktas la laboron de nacia komisiono por la reformo de la edukado en la lando. S-ro Souza apenaŭ trovas sufiĉe da laŭdaj vortoj pri la intenco de la komisiono meti en la instruprogramon ankaŭ la lernadon de la indiĝenaj lingvoj, kio "al la estontaj eurbordanoj ebligis firmigis sian personecon". Oni legas tie ankaŭ jenon: "La neceso enmeti pli da parola literaturo en la novajn programojn estas diktata de nia propra koncepto pri la estonta eurbordano, kiu, por ĝuste aprezi la valorojn de diversaj kulturoj, devas certigi al si firman bazon en la hejmlanda kulturo." La tuta artikolo de s-ro Souza estas verkita en maniero, kiu sugestas, ke la aŭtoro edukiĝis en iu neekzistanta Esperanta lernejo pri la lingvoproblemoj. Tamen, li verŝajne ne havis ŝancon konatiĝi eĉ kun la "reĝo Parzival", por ne paroli pri tio, ke pri li kaj liaj samopiniantoj la Movado ne montris aktivan intereson ĝis nun.

Rakonto samdevena kiel tiu de s-ro Souza, do afrika, sed tute malsamnivela, aŭdiĝis en Beogrado meze de marto ĉi-jare. Tie s-ro B. Kossou, el Benino, direktoro de la Afrika Instituto por Kulturo, havis gazetaran konferencon kaj asertis, ke "dum la sekvanta deko da jaroj, sur la kultura kampo, Afriko frontas la esencan demandon de la nacia kaj kultura malfermiĝoj kaj membruigo pere de la elementa edukado en la gepatra lingvo de ĉiu popolo". Resume sonas ĉi tiu lia frazo: "Se poeto ne kapablas verki en sia gepatra lingvo, li povas esti poeto, sed ne afrika."

La Instituto de s-ro Kossou fondiĝis en 1971 kaj, krom la sidejo en Dakaro (Senegalio), havas filion ankaŭ en Lomeo (Togo). Ĝia ĉefa celo estas helpi al la afrikaj landoj difini la programon de sia kultura evoluo kaj krei klimaton de kunlaboro sur tiu vivo-kampo. Pri la menciita decida jardeko s-ro Kossou klarigis: "La edukado sur tiu nova bazo devas realiĝi en kelkaj etapo. La unua estas la alfabetigo de la

lingvo de ĉiu pli granda popolgrupiĝo. Tiu laboro jam bone progresis en pluraj landoj (Nigério, Togo, Benino, Senegalio, Malio kaj kelkaj aliaj). En la aktuala labor-fazo oni klopodas trovi komunajn formojn kaj normojn en la diversaj regionoj, por tiamaniere malaltigi la kostojn de la tuta projekto.” Tamen, laŭ s-ro Kossou, tio montriĝos esti pli facila etapo, ol tiu venonta fine, kiam necesos politika decido pri la demando, kiu lingvo fariĝos oficiala en difinita lando.

La Instituto devas mem eduki siajn fakulojn, ĉar la mondkonatajn ekspertojn pri la afrika kulturo jam alproprigis grandaj internaciaj organizaĵoj. Tio ne estas novaĵo, amare atentigas s-ro Kossou kaj aldonas, ke en Parizo vivas trifoje pli da kuracistoj el Benino, ol en tiu tuta afrika lando (antaŭe: Dahomeo).

S-ro Kossou parolis ankaŭ pri Franz Fanon kaj ties libro *Nigra haŭto kaj blanka masko*, kiu traktas la bazan dilemon de la nuna afrikano, ”nigra” homo, kies spirito, moralo kaj intelekta evoluo estas ”blankaj”. Al tia afrikano ĉiam pli plaĉas Beethoven, je la kosto de tamtamo. Tamen, la sono de tamtamo ĉesas nervozigi tian afrikanon, kiam ĝi ekfonas en iu okcidenta muzikaĵo, klarigas s-ro Kossou.

La tuta afrika kontinento, eble la plej praa en la homa historio, sed ankaŭ la plej juna rilate siajn klopodojn retrovi kulturan identecon, parolas la saman lingvon de ideoj kiel la Esperanto-movado. Afriko serĉas solvojn por sia komuna lingvo. Ni, kiuj pretendas disponi pri unu el tiuj solvoj, kvazaŭ kaŝas ĝin de Afriko kaj



lasas, ke nia sola reprezentanto tie estu s-ro Serge Reverdin, la ”reĝo Parzival”. Tiu homo nun faras al la Esperanto-movado sian duan lecionon. Li trovas manierojn kaj rimedojn, dum ni sidas kaj atendas. Li kapablas multe pli bone ol ni juĝi pri taŭgaj tempo kaj loko. Ni lernu ion de la ”reĝo Parzival”!

sm

Antaŭ sepdek jaroj

La 28a de aprilo estos la 70a datreveno de la fondiĝo de UEA en 1908. Ni memorigas pri tiu datreveno per kelko da leterfragmentoj, kiujn antaŭ sepdek jaroj skribis anglo Harold Bolingbroke Mudie (1880-1916), la unua prezidanto de UEA, al sviso Hector Hodler (1887-1920), fondinto de la Asocio. Bonvolu atenti, ke ni ne korektis kelkajn lingvajn malglataĵojn, kiuj al la fragmentoj donas ankaŭ iom da lingva aromo.

1908 03 04(?): Certe mi opinias kun vi ke la ekzisto de tia Universala Samideana Asocio estos tre utila kaj fruktoporta aldono al la Esperanta Mondo. . . . Se inter hodiaŭ kaj la templimo vi ne povos trovi iun pli taŭga ol mi por plenumi la rolon de Prezidanto por la venonta jaro, mi kun danko akceptos la honoron kiun vi tiel afable proponis, kaj metos min je via dispono kiel eble plej multe. . . . Mi ĝojas ke amiko Privat tiel bone propagandas.

1908 04 08: Mi kun granda intereso ricevis la internacian ĉekon kiun mi montris al multaj samprofesiaj

kaj tiel faris bonan propagandon kaj pro Esperanto kaj pro Helpmono. Mi pagis ĝin en mian Bankkonton kaj kredeble S^o de Saussure baldaŭ rericevos ĝin de sia bankisto kaj povos ĝin meti en kadron!

Respektinda samideano S^o Printer de Bedford Anglujo forte opinias, ke la U.E.A. devas unue fariĝi unuiĝo de la **naciaj** societoj centraj, kaj certe tiu ĉi propono ŝajnas al mi tute pripensinda.

1908 05 07: Mi tre esperas ke Dr Z. konsentis pri la Hon. Prez. ĉar tiu ŝtopos al nia senfida malamikaro la buŝojn.

1908 05 20: Mia letero pri la afero estis legita ĉe la lasta komitata kunveno de B.E.A. kaj oni raportis ke, kvankam Kolonelo Pollen apogis la aferon, la plejmulto ne ankoraŭ havas fidon, kaj opinias ke la entrepreno estas danĝera.

1908 05 24: Mi resendas la tre interesan respondon de nia taktplena majstro, kaj mi dankas vin pro ĝi. Mi opinias, ke se li havas nenion por kontraŭdiri, estos tute bone por ni ĝin eldonigi.

Ĉiu mila loĝanto esperantisto

UNIVERSALAJ KONGRESOJ de Esperanto ne malofte kunvenigas tiom da esperantistoj, kiom sukcesas veni al ĉiuj aliaj internaciaj movadaj renkontiĝoj en la koncerna jaro, kune. En la kazo de Bulgario ĉi-jare, tiu aserto pruviĝos pli ol simple ĝusta.

Ne temas nur pri la fakto, ke la Kongreso en orient-eŭropa lando fariĝas partoprenebla por miloj da homoj, kiuj de post la UK en Budapeŝto (1966) ne havis eblon vere gustumi la tutmondecon de la Movado. Temas pri alia, multe pli atentinda faktoro: la Esperantomovado havas plej multe da adeptoj kaj sekve ankaŭ sian plej firman bazon ĝuste en tiu mondparto, kie situas ankaŭ Bulgario. Ne mirinde, ĉar temas ja pri la terglobo peco en kiu originis la Internacia Lingvo; temas ankaŭ pri landoj kaj popoloj, kies propraj lingvoj restas ekster la konkuro servi en la internaciaj rilatoj. Tiu lasta aludo signifas, tamen, ke bulgaroj, ĉeĥoj, hungaroj, kroatoj, makedonoj, poloj, rumanoj, serboj, slovakoj, slovenoj ktp., neniel venas al la ideo flegi falsajn imagojn pri daŭra internacia rolo de grandling-

voj, kies superregon ĉiu unuopa el tiuj popoloj jam spertis kaj suferis dum sia historio.

En tiuj landoj oni ame flegas la naciajn lingvojn ankaŭ nun. Oni eble restas iom kulture fermita (= ne forglutita de grandlingvo) kaj konservas altgrade sian identecon, kion oni foje malprave nomas izoliteco. Ĉio ĉi, supozeble, povus esti rigardata kiel tre sana kaj stabila bazo por kompreni la bezonon de komuna internacia lingvo. Tio povus klarigi ankaŭ la fenomenon, ke en tiuj landoj sen okcidentece multaj vojaĝantoj, kun ĉefe korespondaj rilatoj al la resto de la mondo, Esperanto estas enradikiĝinta pli firme ol en la aliaj partoj de la terglobo.

Pasintjare ni iom ŝerce notis, ke pli ol mil partoprenintoj de la 62a UK en Rejkjaviko konsistigis tutan procenton de la somertempa loĝantaro de la islanda ĉefurbo. En Varno mem, kiu ja havas pli da loĝantoj ol la tuta Islando, temos minimume pri du procentoj. Bulgara Esperantista Asocio jam dum multaj jaroj estas ĉe la pinto de la membrostatistiko de UEA laŭ la nombro de siaj anoj. La pasintan jaron, *Bulgara esperantisto*, organo de BEA, havis pli ol ses mil abonantojn, tiel ke nur nia revuo restas al ĝi tiurilate supera inter la movadaj periodaĵoj. Ni diru, ke ankaŭ en Bulgario ne ĉiu esperantisto membras en BEA kaj legas ĝian revuon. En lando kun naŭ milionoj da loĝantoj estas do tute realece supozi, ke ĉiu mila homo estas esperantisto. Tio al mi mem helpas klarigi "strangaĵon", ke antaŭ du jaroj, kiam mi vagis tra Sofio, kelnero en

1908 06 20: La skribpaperon k.c. mi ankoraŭ atendas.

1908 07 03: Laŭ mia forta opinio, oni devus proponi, kaj la Prezidanto kaj Vicprezidanto estas ĉiujare elektataj, sed ke la eksigantaj Prezidanto kaj Vic Prezidanto povos sin antaŭmeti kiel kandidatoj. Tiamaniere, se tiuj oficiroj estas tro mallaboremaj, aŭ se ili iel malkontentigas sian societon, post mallonga tempo alia oficiro anstataŭos ilin. Kontraŭe, se ili bone kaj klopodeme plenumas siajn funkciojn, kaj la societo estas kontenta pri ili, neniu povos esti pli bona por la bonstato de la societo, ol ke tiuj oficiroj estu reelektataj, sed ĉiujare, kaj ne ĉiudujare.

1908 10 06: Mi kun plezuro skribos al la personoj, kiujn vi nomis, por peti ili faru al ni la honoron fariĝi Altaj Konsilantanoj. Persone, mi volus ankaŭ aldoni Michaux, en la espero, ke tiu eble iom helpus revarbi lin por nia afero, sed tio estas riska afero, kaj eble vi tute prave forlasis lin el la listo. Kaj tuj kiam sufiĉe energia Amerikano sin prezentos, ni devos inviti lin.

Senkulpigu mian malbonan skribadon, sed, fiŝkaptinte, mi tranĉis per hoko mian unuan fingron, kaj do devas lami!

Pri la Insignoj, ĉiuj delegitoj, kiujn mi renkontis preskaŭ rifuzas porti la delegitan insignon, pro ĝia eksterordinara malbelececo.

1908 10 16: Pri Alta Konsilantaro, kompreneble ni ne povos inviti la Majstron, ĉar kiel Hon. Prez. li jam estas la plej alta konsilanto.

1908 11 27: Mi devas konfesi, ke la aerveturada fako ŝajnas al mi ne tro aprobinda kaj eĉ iom ridinda, sed se vi jam entreprenis la aferon, nenio plu estas dirinda.

Mi varme apogas la Amerikan inviton kaj ankoraŭ bedaŭras ke oni ne tuj konsentis fari la Hispanan viziton en Pasko. Mi tute rifuzas alveturi Barcelonon en Aŭgusto. La homo estas mortema!

1908 12 08: Mi trovas ke vi tre malsaĝe agis, enmetinte la tre Bohemnacian artikolon en ESPERANTO. Kompreneble vi mem ne akceptas la ideojn de ĉiuj subskribitajn artikolojn, sed presiginte ĝin, vi nepre aliigis la simpatiojn de la — por nia afero tre valora aro da — Germanparolantaro. Ili estos FURIOZAJ kaj vi devas iel fari "amenda honorable". . . . Jes, Amerika Kongreso estos 1910 kaj Hispana Sept.: sed, eĉ tiam la vetero estos ŝvitigea.


1909 01 04: . . . mi proponas ke konsente kun Centra Oficejo kc. UEA nomu en ĉiu lando **Konata kaj Fidindan** agenton kiu akceptos la kotizajn pagojn . . . Tiu ŝparos ĉiun multe da peno laboro kaj perdo. Generalo Sebert aprobis la ideon jam en Dresdono. Sed ĝi postulas **precizajn** agentojn!

restoracio kaj vendistino en butiko, konstatinte mian eksterlandecon, alparolis min en Esperanto. Ni do konsciu, ke irante al Bulgario ĉi-jare, ni iasence iras al la fajrujo de la amasa Esperanto-movado.

Kial tiom da homoj iras al Bulgario?

Antaŭ du jaroj, en 1975, Bulgarion vizitis pli ol kvar milionoj da eksterlandaj turistoj, el kio el la okcidentaj landoj venis pli ol unu miliono. Kvankam ni nun ne disponas pri la ciferoj por 1976 kaj 1977, estas certe, ke ili estis konsiderinde pli altaj. Por lando, kiu ne apartenas al tiu klasika turisma lando-klubo (Hispanio, Francio, Svislando, Italio, Greklando), tio estas pli ol imponaj nombroj. Kiel klarigi tiun subitan turisman furoron de Bulgario? Malaltaj prezoj kaj grandaj investoj certe liveras parton de la klarigo. Sed, jen alia eventuala kompletigo por kompreni la fenomenon:

El 111 000 kvadrataj kilometroj da areo, proksimume triono de Bulgario estas altaj montoj, alia triono ebenaĵoj, kaj la resto konsistas el montetaro kaj valoj. Kun longa marbordo, la riverego Danubo kaj centoj da riveroj kaj riveretoj aldone, ni venas al kompleta vario de la bulgara pejzaĝo, kiu estas minimume tiel klasika, kiel la islanda pasintjare estis unika. Kia ajn do estu turista prefero tiurilate, Bulgario povas kontentigi ĝin. Bulgaroj estas slava popolo kun sufiĉe ekscita origino, kiu ligiĝas al la mongolaj triboj de la t.n. "proto-bulgaroj", kun ekzotikaj nomoj kiel Utiguri kaj Kutriguri,



Ne simple metio, sed arto: Lignoĉiza pordo de la ikonostazo en la preĝejo de la Sankta Virgulino en Rila.



La "bulgara Gioconda": Princino Desislava sur fresko el 1259 en la preĝejo Bojana apud Sofio.

kiuj en la 7a jarcento de la nuna erao venis al Balkana Duoninsulo kaj tie kun siaj ĥanoj — Krum (802-814), Omortag (814-831) — baldaŭ poste kreis ŝtaton. Pro sia geografia situo, ĉe la norda landlimo de la tiama Bizanca Imperio, Bulgario jam dum la reĝo de la princo Boris (852-889) konvertiĝis al kristanismo (865) kaj tiel fariĝis la plej malnova ortodoks-kristana lando inter la slavaj popoloj. Iom poste tie aktivis la fratoj Cirilo kaj Metodo, kreintoj de la slava (= cirila) alfabeto kaj unuaj klerigistoj en tiu mondparto.

Tiu informo kondukis nin al, miaopinie, ŝlosila komplemento de la turisma populareco de Bulgario: Kun tiel fruaj kristaniĝo kaj alfabetigo de sia lingvo, la lando elkreskis tra la jarcentoj en ion kulture tre apartan, apenaŭ malpli foran al la okcidentaj, ol al la orientaj kulturoj. Slavaj popoloj ĝenerale estas kulture io tute aŭtonoma en Eŭropo, al kiu ili restas ne pli konataj, ol ekz. japanoj aŭ hindoj. Tial okcidentano gapas antaŭ slavaj freskoj kaj ikonoj, antaŭ slava dancarto, antaŭ parola literaturo kaj eklezia muziko, ne malpli ol li gapus ekz. antaŭ japana noo-teatraĵo aŭ hinda mitologia labirinto. Por okcidentano, Bulgario kulture situas profunde en la nekonata oriento. Ankaŭ tio do devus ludi esencan rolon, kiam nuntempa turisto elektas Bulgarion por la celo de sia vojaĝo.

Multo nova por vidi kaj aŭdi

Kiam oni vidas la preĝejon en la vilaĝo Bojana (proksime al Sofio), konstruitan iam inter la 11a kaj 13a jarcentoj, ĝiaj freskoj trudas la konstaton, ke la renesanco pentroarta komenciĝis en loko alia ol ni lernis kaj kutimis akcepti. Vizito al la monaĥejo Rila detruas

niajn imagojn pri monaĥaj simpleco kaj malabundo, ĉar Rila (10a jarcento) estas palaco de arkitektura pompo, ornamita per tuta gamo da koloroj (sur freskoj kaj ikonoj) en maturaj nuancoj, kiujn la okcidenta pentroarto ankoraŭ ne malkovris. Ankaŭ en aliaj monaĥejoj kaj preĝejoj tra Bulgario, kaj precipe en la ikon-kolekto de la katedralo Aleksandro Nevski en Sofio, eblas sperti tiun mezepokan, sed samtempe tiel novan gloron de la bizanca skolo en la pentroarto, kiun tiel abunde povas nuntempe oferti, krom Bulgario, nur la duoninsulo Athos en Greklando kaj la mezepokaj preĝejoj de la sudorienta Jugoslavio.

Al Bulgario oni iras ankaŭ pro muziko. Eble ne unuafoje pro tiuj basaj voĉoj, kiuj pleje proksimiĝas al la oper-monda legendo de la ruso Ŝaljapin. Eble ankaŭ ne pro la tutaj flirto, pimpo, petolo kaj voĉa virtuo de la bulgaraj popolaj danco kaj kanto, ĉar ilin ofte, kiel en la resto de la mondo, "ĝenas" instrumenta muziko. Mi revas reiri al Bulgario pro ĝia eklezia muziko. Nur la homa voĉo, en himnoj kanoniĝintaj tra la lastaj dek du jarcentoj, en la malnov-slava (fakte: malnov-bulgara) lingvo, sen ajna instrumento, sed kun totala supereco de la voĉkordoj al ĉiuj instrumentaj soneruptoj kaj ĉirpoj artifikaj. Kiam la koruso "Svetoslav Obretenov" kantas en la baziliko Aleksandro Nevski, oni malkovras novajn dimensiojn de la arto muziko kaj la estaĵo Homo.

Eĉ se via ĉefa prefero estas — nenio

Ankaŭ la urbo mem de la 63a Universala Kongreso de Esperanto — Varno — ne estas simple unu plia ĉarma marborda feriejo. En la lasta jardeko oni tie elfosis prahistorian nekropolon, kies riĉo — pli ol kvin kilogramoj da oraj braceletoj, ringoj, butonoj ktp. — konfuzis la arkeologojn. Oni emas konsideri tiun antikvan tombejon, sen homaj restaĵoj, unu el la plej praaj en Eŭropo kaj ligi ĝin al la kvara jarmilo antaŭ nia erao.

Tamen, eĉ se onin interesas nenio el la historiaj kaj kulturaj riĉo kaj specifeco de la lando, se oni volas ferii korpe kaj mense, se oni estas la plej ordinara ano de la miliona turista grego, nur ero en difinita vojaĝagenteja "pakaĵo", se oni pretendas nur la sunbrilon, sablan marbordon, komfortan liton kaj bongustan manĝon, — irante al Bulgario oni elektis ĝustan celon. Ni tamen esperu, ke la membroj de la Esperanto-movado ne estas — feliĉe — tiaj plej ordinara turistoj. Ĉar, esti adepto de la internacia lingvo kaj kulturo inkluzivas aktivan intereson pri la naciaj identeco kaj kulturo de tiu tipo, kiun ofertas ĉi-jare al ni la kongreslando Bulgario. Ni do iru tien ne nur por letargie ĝui antaŭpagitan komforton, sed ankaŭ por vidi, sperti, lerni, kleriĝi, por praktiki tiun unikan internaciecon sur la unuopula nivelo, kies komplikoj ni estas, por ebligi al aliaj movadanoj sperti aŭ regustumi ĝin.

S.M.

La monaĥejo Rila estas la plej fama inter la bulgaraj ekleziaj institucioj. Tra la lastaj dek jarcentoj ĝi ludis ne nur ekleziajn rolojn, sed ofte estis ankaŭ la kultura metropolo de la lando kaj rezistonesto kontraŭ klopodoj konkerinte la areon konkeri ankaŭ la kulturan identecon de la bulgaroj. Rila nun estas elokventa rakonto pri la pasinteco, necesa leciono por la estonto.





LA IAMA BULGARIO:

Tri virinoj rakontas...

En 1854, Frances (Fanny) Duberly (1829-1903), el Britujo, akompanis sian edzon Henry al lia milita posteno en Krimeo. Ĝis ili povis daŭrigi al Sevastopol, ili devis halti dum unu monato, kune kun aliaj britaj soldatoj, en la ĉirkaŭaĵo de Varna. Julia Pardoe (1806-1862), revenante al Anglujo, post kelkara restado en Turkujo kun sia patro, vojaĝis laŭ Danubo ĝis Budapeŝto. Lady Mary Wortley Montagu (1689-1762), kies edzo estis la nova brita ambasadoro en Konstantinopolo, survoje tien tranoktis en Sofio. Impresoj pri Bulgario, de tri diversaj virinoj, kiuj vojaĝis pro tute diversaj kialoj, eble interesos tiujn kiuj intencas ĉeesti la Kongreson en Varna, sed ankorau ne decidis ĉu atingi ĝin velŝipe aŭ ĉevale...

FANNY DUBERLY forlasis Anglujon per ŝipo la 24an de aprilo 1854 kaj finfine atingis Varna la 1-an de junio: "Ni ekvidis Varna defore, ĉirkaŭ la naŭa horo. Ĝi estas malgranda, sed puraspekta urbo . . . Ĉi tie la elŝipigo de ĉevaloj estis danĝera kaj mal-

oportuna, ĉar oni devis mallevi ilin en boatojn, kaj remi ĝis la marbordo. Ĉiuj ĉevaloj estis timigitaj, kelkaj tre ribelemaj. Unu rajdĉevalo piedbatis du virinojn, mordis trian, kaj ĵetis kvaran en la maron.

. . . Ni marŝos morgaŭ matene je la kvina al Devna, vilaĝo proksimume dek naŭ mejlojn en la kamparon. Enpakinte ĉion, mi sidiĝis ekster la tendo, kaj volvis min en la novajn belecojn de la sceno — la granda ebenaĵo, bordanta vastan lagon, gloraj koloroj de la sunsubiro, militema konfuzo de la malfono, husaraj kaj



artileriaj ĉevaloj ŝnurligitaj; infanterio tenduminta, turkaj soldatoj galopantaj tien kaj reen sur siaj vervaj ĉevaloj, kaj la fumo de la tendofajroj kiu ĵetis bluan nebuleton kiel ŝalon super la tuton.

Nia tendokampo estas tute pitoreska, meze de granda kaj fekunda ebenaĵo, apud glima rivero, kaj tapiŝita de brilaj floroj — delfinioj, rozoj, kaj borago. Henry kaj mi vagis inter la montetaj deklivoj ĉi-posttagmeze, kaj

la ĉevalo rapidis super la longaj herboj kaj delikataj konvolvuloj, henante gaje pro liberiĝo de sia ŝnuro, kie li devis toleri pluvon kaj venton senĉese dum du tagoj kaj noktoj.

La 22an de junio: Henry kaj mi komencis je duon-horo post la tagmezo rajdi al la infanteria tendaro. Ni maltrafis la ĝustan vojon kaj faris dek tri mejlojn el sep. Ni vagis tra la plej ravaj arbaroj, tra sunplenaj interspacoj kaj deklivetoj el dolĉaj printempaj floroj, preter arboj tra kies verdaj folioj la ora sunlumo falis kvazaŭ pluveto, kaj tra densaj ombroj kaj boskoj, sub kiuj niaj ĉevaloj apenaŭ povis trapaŝi. Alveninte en la tendaron, ni demandis pri deko el niaj amikoj kaj aŭdis, ke ili ĉiuj, sen ajna escepto, jam foriris al Varna; do estis nenio farebla krom turni la ĉevalojn hejmen tra la laciga varmego. Rapidante hejmen por trafi la vespermanĝon (ni dume jam ricevis nenion krom pecon da pano kaj glason da akvo bonkore donitajn al ni de komplezema proviantisto), ni trovis nur trompitajn esperojn, ĉar la fundo de la poto estis forfalinta, kaj la tuta gulaŝo kuŝis en la fajro.

La 26an de junio: Henry kaj mi denove rajdis ĉi-vespere. Ni turniĝis en la rokan valon, maldekstre de la tendaro, sed lasante la vojon, ni ekiris malvastan padon kun arboj, superrigardatan de severaj vertikalaj rokoj, ĉe kies subo kondukis malvasta fendo, laŭlonge de kiu ni malrapide rajdis. Elveninte finfine, ni atingis malferman ebenaĵon kovritan de peza staraĵo el hordeo; transirante tiun mallongan distancon, ni venis poste en alian densan boskon de arbedoj kaj ni devis desupri laŭ krutega kaj roka grundo, kie la ĉevaloj apenaŭ povis teni siajn hufojn kaj kie mispaŝo estus fatala. La steloj lumigis nian vojon, kaj ni malsupreniris sen akcidento. Ni trovis nin sur la vojo al Devna, kaj vigligante niajn ĉevalojn, ni galopetis super la ebenaĵo ĝis nia tendaro.


La 29an de junio: Je la sepa kaj duono matene, ni ekvojaĝis de Devna al Varna, trans belaj montetoj ĝis Aladin, kaj poste al Varna laŭ la supra vojo. La rajdo estis belega. Ni preterpasis rimarkindan geologian formaĵon el grandaj rokoj, similaj al ruinoj de granda templo kun multaj turoj. Ni atingis la novan tendaron je la tagmezo. Je la kvina vespere ni ankoraŭ vidis neniun eblecon ricevi ion por manĝi (ni estis ricevintaj nenion de post la sesa matene) kaj mi ne povis plu elteni, do ni spronis la ĉevalojn, kaj galopis al Varna. Ĉi tie, kompreneble, ni trovis ĉiujn vendejojn fermitaj; sed post iom longa serĉado, ni trovis en strateto malgrandan restoracion, kie ni ricevis bonegan supon, terurajn kotletojn, kaj bonan makaronion . . .”

LA VOJAĜO DE JULIA PARDOE, laŭ Danubo, okazis en 1836: “Post nia foriro el Silistria, ni preterpasis kelkajn arbokovritajn insulojn, borderitajn de riversalikoj, formantaj perspektivojn, kiuj ŝajnis preskaŭ artefaritaj. Dum ni preternavigis unu el ili, la suno subiris malantaŭ la fonajn altaĵojn, kaj ĵetis tra la ĉielon kolornuancojn tiel riĉe kaj profunde markitajn, ke ili igis la riverondetojn brili kiel likvaj gemoj kaj

donis al la fluo aspekton de diluitaj ametistoj kaj topazoj. Mi neniam vidis pli gloran sunsubiron ol en tiu vespero.

Je tiu momento subita kurbiĝo de Danubo alportis nin sub rokon kronitan de polviĝantaj ruinoj de ĝenova kastelo, ĉe kies subo grego da kaproj paŝtiĝis sur la verda boskaĵo, kiu vestis ĝiajn fendojn. Nenio plu estis necesa por kompletigi la belecon de la bildo, kaj ekde tiu momento ni ĉiuj ekesperis je pliboniĝo de la aspekto de la pejzaĝo, tra kiu ni ankoraŭ devis vojaĝi.

La venonta urbo, kiun ni atingis, estis Ruschuk (Ruse), kiu estas konsiderinde ampleksa, ĉirkaŭita de muro kaj fosaĵo. Ĝi havas nur 3 000 loĝantojn, kvankam antaŭe ĝi fieris pri 30 000, sed ĝi montras neniujn simptomojn de tiu forlasiteco, kiun mi rimarkis



en kelkaj aliaj urboj ĉe la rivero. Ĝi posedas naŭ moskeojn, kaj ĝia ĉefstrato estas pli vasta kaj pli zorge pavimita ol iu ajn en Konstantinopolo . . .

Bulgario plibeligiĝis dum daŭris nia vojaĝo. Noblaj montetoj, bele vestitaj de arboj radiantaj je ĉiuj ĉielarkaj nuancoj de aŭtuno, kaj formantaj kontrastojn inter, unuflanke, la profundaj riĉaj sienaj koloroj de la paliĝanta fago kaj la hela flavo de la velkanta juglando, kaj, aliflanke, gajaj ruĝaj tigoj de la sovaĝa vito, kiu ĵetis siajn rubenkolorajn girlandojn de arbo al arbo, kunligante ilin en unu ardan florkronon. Komfortaj vilaĝetoj, ĉiu kun sia malgranda floto de fiŝistaj barkoj, kaj sia sabla marbordo plena je rigardantoj; gregoj da ĉevaloj saltantaj super la montetoj kun tute gracia gajeco de libero; aroj da bubaloj, kiuj kuŝis en la

profunda koto de la rivero, ripozante en la suno . . . Vitejoj, kiujn superombris fruktaroj, kampoj ordeme ĉirkaŭbaritaj, fekundaj je legomoj kaj greno, sinsekve variigis la pejzaĝon; nek ni tediĝis de la sceno, kiam, je la dua horo, ni atingis Sviŝtov, malgrandan sed florantan urbon, kun ruino de malnova kastelo, sidanta sur monteto tuj super ĝi . . . Iom post la sepa vespere ni trovis nin apud Nikopolis; sed pro la mallumo, ni povis vidi nur la silueton de la urbo, kiu tratranĉis la horizonton, kaj eltrovis, ke ĝi estas agrable vasta, ĉirkaŭita de altaj, apikaj klifoj . . .

Je la tria matene, ni rekomencis en plena inundo de lunbrilo, ĝis ni atingis Vidin. Ĝi estas granda kaj bela urbo. La palaco de la Paŝao, bazita sur la eksteraj muroj, aspektas morna kaj senkomforta, sed ĝiaj fenestroj malfermas noblan rigardon al la rivero. La minaretoj de dekduo da moskeoj reliefas sur la silueto de la tuto . . .

La aspekto de la lando pliboniĝas tra la tuta tago: abruptaj kaj krutegaj altaĵoj, arbaraj tute ĝis la pintoj, etendiĝoj de maizo kaj paŝtejoj . . .; ridantaj ebenaĵoj,



gajaj je herbo kaj sovaĝaj floroj, rapide traflugetis, dum la nubokrestaj montoj formis noblan fonon de la bildo. Je la tagmezo, ni atingis Florentin, la lasta bulgara vilaĝo sur la rivero, kaj certe la plej pitoreska loko de la malsupra Danubo. La vilaĝeto nestis sub roko, tri el kies flankoj estis lavataj de la rivero, dum la kvara estis ŝirmita de profunda fosaĵo, kaj la alta, vertikala roko mem estis kronita de gotika kastelo, kies griza silueto, ŝajne preskaŭ perfekta, tranĉis abrupte kontraŭ la ĉielo kaj kompletigis scenon tiel impone belegan, ke ĝi eltiris komunan ekkriion de raviĝo”.

LADY MARY WORTLEY MONTAGU, en aprilo 1717, skribis de Adrianopolo (Edirne), al amikino en Anglujo, pri sia ĵus farita vojaĝo:

“Post dekunu-taga vojaĝo el Beogrado, super la montoj, ni venis al Sofio, situa en granda, belega ebenaĵo sur la rivero Iska, ĉirkaŭita de foraj montoj. Apenaŭ eblas vidi pli agrablan pejzaĝon. La urbo mem estas tre granda, kaj ekstreme homplena. Jen estas varmaj banejoj, tre famaj pro siaj sanigaj ecoj. Mi haltis tie unu tagon, ĉirkaŭ la deka matene, por vidi ilin. Ili estas konstruitaj el ŝtono, en formo de kupolo, sen

fenestroj, krom en la tegmento, kio donas sufiĉan lumon. Estas entute kvin tiaj kupoloj kunigitaj, el kiuj la plej fora estas pli malgranda ol la ceteraj, kaj funkcias nur kiel vestiblo. La venonta ĉambro estas tre granda, pavimita per marmoro. En tiu ĉi ĉambro estas kvar fontoj kun malvarma akvo, kiu falas unue en marmorajn basenojn, kaj poste fluas sur la planko en malgrandaj kanaloj faritaj tiucele, kiuj kondukas la fluetojn en la venontan ĉambron, kiu siavice estas iom pli malgranda, sed tiel varmega pro sulfuraj vaporoj, kiuj venas el la apudaj banejoj, ke ne eblas resti tie vestita. Ĉe la du aliaj kupoloj estas varmaj banoj, unu el kiuj havas kranojn kun malvarma akvo por alĝustigi la temperaturon laŭ la bontrovo de la banantoj.

Mi portis miajn vojaĝajn vestojn, nome rajdan robon, kaj certe ŝajnis tre eksterordinara al la virinoj. Sed eĉ unu el ili ne montris la plej malgrandan surprizon aŭ impertinentan scivolemon, sed akceptis min kun kiel eble plej kompleza ĝentileco. Mi kredas, ke sume estis ĉirkaŭ ducent virinoj, sed kun neniuj el tiuj super-ecaj ridetoj, aŭ satiraj flustroj, kiuj neniam mankas en niaj kunvenoj kiam iu ajn eniras, kiu ne estas vestita precize laŭ la modo. Ili ripetis al mi fojon post fojo: ‘ĉarma, tute ĉarma’. La unuaj sofoj estis kovritaj de kusenoj kaj belegaj tapiŝoj, sur kiuj sidis la sinjorinoj; kaj sur la duaj, malantaŭe, sidis la sklavinoj, sed sen ranga distingo laŭ la vestoj, ĉar ili ĉiuj estis en stato natura, tio estas, nete dirite, tutnudaj, sen kaŝi iun ajn belajn aŭ difekton. Kaj, tamen, ne okazis eĉ la plej malgranda diboĉa rideto aŭ malmodesta gesto inter ili . . .; ĉiuj sidis en malsamaj pozoj, kelkaj en konversacio, kelkaj laborantaj; aliaj trinkis kafon, multaj kuŝis senĝene sur siaj kusenoj, dum iliaj sklavinoj (kutime belaj knabinoj de 17 aŭ 18 jaroj) laboris je plektado de iliaj hararoj en diversajn agrablajn formojn. Mallonge, tio estas la virina kafejo, kie oni rakontas la novaĵojn de la tuta urbo, kie skandaloj kreiĝas, ktp.

La mastrino de la domo invitis min senvestiĝi kaj bani kun ili, kaj, kiam mi nesufiĉe rapidis, unu el la plej belaj venis por malvesti min. Vi ne povas imagi ŝian surprizon kiam ŝi levis mian robon kaj vidis min tute ĉirkaŭita de miaj korsetaĵoj. Ŝi forkuris, iom timigita, kaj diris al sia amikino ke “la edzoj en Britujo estas multe pli malbonaj ol en Oriento, ĉar ili ligas siajn virinojn en malgrandajn kestojn, laŭ la formo de iliaj korpoj. . .”. Ili ĉiuj konsentis, ke temas pri unu el la plej grandaj barbarajoj de la mondo, kaj kompatis eŭropajn virinojn, ke ili estas tiaj sklavoj. Ili kredis, ke ĝin malligi estas tute ekster mia povo.”

La postan tagon la grupo forlasis Sofion, kaj post kvar tagoj atingis Filipopolon (Plovdiv), “trapasinte la krestojn de la montoj Rodope, kiuj estas ĉiam kovritaj de neĝo. Tiu ĉi urbo situas sur dekliva tero apud la rivero Hebrus . . . La lando de tie ĝis Adrianopolo estas la plej bona en la mondo. Vitoj kreskas sovaĝe sur ĉiuj montetoj, kaj la ĉiama printempo, kiun ili spertas, igas ĉion aspekti gaja kaj floranta.”

Julie Tonkin

Multaj anonimaj uzantoj kunkreis la lingvon

Kiam oni kontraŭbatalas antaŭjuĝojn pri Esperanto, mallerta argumentado rezultigas pli da malbono, ol rezultigus prisilento. S-ro Claude Piron, jam bone konata al niaj legantoj, reagis al peto rebati aserton en franca gazeto, laŭ kiu Esperanto estas senviva artefarita elpensajo de unu sola homo kaj tial kontraŭas kreivon. Li poste proponis ankaŭ al ni ĉi tiun tekston, kies ĉefa instruo estas: Unu homo ne povas krei lingvon, ĉar lingvo estas vivanta estaĵo.

“LINGVO ESTAS IO VIVANTA. Esperanto, artefarite kreita de unu homo, ne estas vera lingvo. Sekve, ĝi ne povas esti taŭga internacia komunikilo: vivo al ĝi mankas”. Al tiu aserto konstante ripetata de niaj kontraŭuloj ni ĝis nun kutime rebatis: “Tiel ligi lingvon al vivanta organismo estas senbaze. Lingvo estas ne biologia fenomeno, sed socia”. Tiu rebato certe estas **objektive** ĝusta, sed mi demandas min ĉu, uzante ĝin, ni saĝe agis — **psikologie**.

Tia rebatado ja neglektas la fakton, ke metaforo ne havus sukceson, se ĝi ne estus almenaŭ parte prava. Ĉu estas do io komuna al lingvo kaj al vivanta estaĵo? Jes: ambaŭ estas strukturoj, kiel, cetere, multaj aliaj realaĵoj, ekzemple ĉiu daŭranta societo.



La lingvo pulsas nur en la uzado. Nur tiel ĝi senĉese disvolviĝas, moderniĝas, poluriĝas, vivas, . . .

Post kiam ili stabiligis en sia ekzistado, lingvo, vivanta estaĵo kaj societo posedas komune jenajn karakterizojn: ili havas historion de kreskado; ili fariĝis loko de konstantaj ŝanĝiĝoj, tamen konservante sian identecon; ili ĉerpas el la ĉirkaŭmondo elementojn, kiujn ili asimilas al si, kaj forĵetas elementojn ne asimileblajn; ili formas unuon, distingeblan disde aliaj similaj unuoj, kiu estas io pli ol la sumo de la eroj; kaj ilia ‘vivo’ iel estas pli-malpli aŭtomate regulata de leĝoj propraj al la sistemo, kiuj ne ĉiam estas konscie elektitaj.

Unu el niaj grandaj eraroj, kiam ni diskutas pri Esperanto, estas diri, ke ĝin **kreis** Zamenhof. Tio ne estas vera, kaj Zamenhof mem ĉiam emfazis, ke li ne estas kreinto, nur iniciatinto. Dirante ke Zamenhof kreis, ni similigas lin al iu Dio, kaj niaj aŭskultantoj reagas kontraŭstare, tute prave, ĉar nia aserto ne estas ĝusta: Zamenhof ne pli povis krei lingvon, ol viro povas, tute sola, havigi al si idon. Zamenhof estis la proponanto, la fekundiganto — aŭ, se vi preferas: patro, semanto — sed por ke vivo aperu, necesis ke la semo trovu medion — patrinon, grundon — en kiu, fiksiĝinte, ĝi povu disvolviĝi. Tiun grundon konsistigis la homa kolektivo, kiu pretis akcepti lian proponon, kaj ĝin efektive alprenis.

Esperanto rezultas ne nur el la verko de Zamenhof, sed ankaŭ el la multhoma medio, kiu enkorpiĝis en sin liajn lingvajn proponojn kaj ilin pliriĉigis. En la hodiaŭa Esperanto svarmas lingvaj elementoj, kiuj devenas ne de Zamenhof, sed de tiu aŭ alia aŭtoro (Grabowski, Kalocsay, Waringhien...), aŭ de nekonataj simplaj uzantoj de la lingvo (kiu do naskis la vortojn *teko*, *trajno*, *krokodili*, ktp?).

Tiuj lingvaj elementoj envenis nature, ĉar la Esperanto-medio sentis ilin utilaj kaj konformaj al la leĝoj de la tuto, t.e. al la ĝenerala strukturo. Aliflanke, kelkaj Zamenhofaĵoj (vortoj kiel *elrigardi*, *gento*, *regno*; la ofta uzo de *-igadi*) praktike ne plu apartenas al la lingvo nun vivanta. La ĝenerala strukturo ilin ‘emeritigis’, kiel societo proponas al maljuna membro fariĝi ne-plu-aktiva kaj, kiel la koncernaj membroj de societo, ili nun montriĝas nur sporade.

Aliaj elementoj ne estas asimileblaj, kaj la ĝenerala strukturo ilin tuj rifuzas aŭ forvomas. Kelkfoje, aro da similaj rifuzitaj elementoj strukturiĝas en alian

tuton, ekstere de Esperanto. Tiam eksteran tuton el elementoj en Esperanton neasimileblaj prezentas per si Ido.

Se ni diras ke Zamenhof 'kreis - inventis - elpensis - konstruis' Esperanton, ni falsas la veron: ni konfuzas la tutan nun vivantan lingvon kun la unua broŝuro, kaj ni kondukas nian aŭskultanton al simila konfuzo. Ni kredigas ke unu homo, sola, povas krei vivon, kaj negativa reago el tio tuj rezultas. Nia diro estas sentata kiel sakrilegia. Nia kunparolanto emos ne kredi nin, ĉar li intuicie scias, ke lingvo vere vivanta estas io tro riĉa kaj kompleksa, ol ke unu sola homo povus krei ĝin.

Mi do proponas, ke en nia informado pri Esperanto, ni uzu la biologian metaforon. Ni diru, ke Esperanto estas vivanta lingvo precize, ĉar okazis renkonto inter fekundiga ĝermo (la broŝuro de 1887) kaj medio (grundo, utero), el kiu ĝi ricevis multegajn nutrajn elementojn, kiuj ebligis al ĝi disvolviĝi, unue delikate, kiel eta embrio, kaj poste pli kaj pli vaste kaj fortike.

Ĝuste ĉar ĝi estas, iamaniere, vivanta estaĵo, Esperanto enhavas korean forton. Lingvo ne povus vivi, se ĝi ne kapablas konstante estigi novajn formojn. Kiam iu ekuzis la vorton *krokodili* kun la konata senco 'paroli alian lingvon ol la internacia en esperantista medio', lia krea imago, lia lingva fantazio iniciatis ion, kio fariĝis riĉigaĵo, kiam la nova signifo iĝis vaste akceptita. En letero de irana esperantistino mi vidis la vorton *osa* (el la verba finaĵo -os) kun la senco 'estonta, venonta'. Tio estas propono, semo de io vivkapabla. Se la medio akceptos ĝin (kaj mi tuj diru, ke ĝi plaĉas al mi), ĝi fariĝos nova kreaĵo en la lingvo. Se la medio forĵetos ĝin, ĝi malaperos: estos nur semo perdita.

El tiuj ekzemploj videblas, ke lingvo estas kreiva pro du kialoj: unuflanke, ĉar ĝiaj elementoj estas senfine novkombineblaj; aliflanke, ĉar la homa menso havas same senfinan lingvan fekundecon: ĉiu infaneto, ĉiu adoleskanto, ĉiu grupo, en iu ajn kulturo, kreas lingvajn novformojn, el kiuj la plimulto formortas manke de akceptanta medio.

La krea procezo estas kompleksa. Ĝi enhavas almenaŭ tri stadiojn: 1) la lingvostrukturo, per sia naturo

mem, 'invitas' la homojn kunmeti el ĝi novajn formojn pli trafajn aŭ prunti formon el ekstere por havigi al la lingvo ion, kio mankis al ĝi; 2) iu imagas la novan trafan formon kaj ĝin proponas (ekuzas); 3) la lingvoporta kolektivo ĝin akceptas, pli-malpli rapide, en la kutiman uzadon. Nur tiam la krea povo de la lingvo vere aktualiĝis.

Aŭtomata regulado okazas per tio, ke iom ampleksa kolektivo deve sekvas la norman leĝon statistikan: ekstreme konservemaj homoj, kaj ekstreme novigemaj, necese estas malmultaj, kaj ilia efiko sin kompensas reciproke. La plimulto estas mezkonservema meznovigema: el la multaj proponoj de la novigemuloj ĝi konservas nur la plej trafajn, dank'al la sobriga sinteno de la konservemularo.

Tion Zamenhof intuciis. Eble lia plej originala kontribuo al la mondo estis akcenti, ke internacia lingvo devas evolui **nature**, kiel vivanta estaĵo. Tion li klare diris en la Antaŭparolo al la Fundamento: "tiu perfektigado fariĝados (...) per vojo natura", "Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos **arĥaismo**, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo".

La argumento plej ofte uzata de niaj kontraŭuloj estas ke tutan lingvon unu homo ne povas krei. Ili pravas! Se ili ne scias, ke Zamenhof neniam pretendis krei tutan lingvon, ĉu pri tio kulpas ili, aŭ nia propra neekvilibra rigardo al la vero? Ni estas samtempe nefikaj en nia informado kaj nefidelaj al la profunda intuicio de Ludoviko Lazaro koncerne la vivon de lingvo, kiam ni asertas — kiel, bedaŭrinde, ĉiu naci-lingva enciklopedio —, ke Esperanton 'inventis' aŭ 'kreis' la juna kuracisto el Bjalistoko.

Grundo per si mem ne naskas kreskaĵon, sed semo sen grundo sekiĝas mortiĝe. La biologia metaforo pri-lingva estas grandparte ĝusta. Ni ne hezitu apliki ĝin al Esperanto. Niaj aŭdantoj komence miros, sed ek-konsciiĝos, ke eble ili komprenis ĉion fuŝe, ke eble ili havas antaŭjuĝojn. Poste, ili ekvidos la problemon laŭ nova, pli sekvebla perspektivo. Kaj pro tio ili dankos nin.

Claude Piron

LA TROFEOJ

LA NEKONATA KONATO

PRIMICO

metropoliteno

Apude estas nur kelkaj el la titoloj, kiuj reprezentas viglan eldonan aktivecon de la nun gvida Esperanta eldonejo.

LA TROFEOJ (prezo: 12,00 gld.) estas majstra traduko de la fama sonetaro de José Maria de Hérédia; LA NEKONATA KONATO (6,60 gld.) estas titolo de streĉa detektivromano, originala, de D.P. Boatman; PRIMICO (10,50 gld.) titoliĝas brila traduko el la poezia heredaĵo de Tagor; METROPOLITENO (bind. 32,70; broŝ. 24,00 gld.) de Varankin estas ĉefverko de la Esperanta literaturo. Ĉiuj ĉi libroj estas nun mendeblaj ĉe UEA, kun rabato de 33% (por minimume 3 ekz.).



Valora enhavo en altnivela formo

Recenzas Henri Vatré (Svislando):

La granda kaldrono de John Francis (1924 -). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978. Belliteratura eldonserio n-ro 37. 692p. 21cm. ISBN 90 6336 001 0.

Se ni facile komprenis, ke malfavoraj cirkonstancoj prokrastis dum 20 jaroj (1938-1958) la aperon de *Vojaĝo al Kazohinio*, ni ja rajtas miri, ke la manuskripto de *La granda kaldrono*, kiu jam pretis komence de 1964, devis atendi eldoniĝon dum 14 jaroj! Evidente ĝia nekutima amplekso kaj eble ankaŭ ĝia temo prezentis riskon por eldonisto. Ni povas des pli dankeme gratuli al Torben Kehlet kaj Stafeto, ke ili ĝin publikigis en plaĉe impona volumo.

John Francis por la tria fojo surprizas la legantojn: Dek ok jarojn post "Kvaropo" aperis "Vitraro", kaj nun, post pliaj dek ok jaroj, li regalias la Esperantan literaturon per la plej ampleksa originala romano.



Dirite iom pli rekte, la apuda recenzo asertas, ke "La granda kaldrono" estas la plej bona romano en Esperanto.



Motivite de firmaj personaj opinioj kaj de riĉa rikolto da observoj, John Francis celis, unue, montri kiel la diversaj membroj de du parencaj skotaj familioj kondukas antaŭ la fenomeno milito aŭ ĝin trasuferas, kaj, due, iel omaĝi la senkompromise kuraĝan lukton por pli justa socio de la glasgova revoluciisto John Maclean. La aŭtoro uzis tute originalan konstruon, prezentante alterne, sed en konstanta paralelo, la okazaĵojn dum 1914-18 kaj tiujn dum 1939-45, per lerta interplekto, kiel ĉe la du temoj de fugo. Tiu metodo sendube ravis nerutinemajn legantojn, sed perpleksigos aliajn. Mi konfesas, ke mi devis fari al mi helpan gvidtabelon por sukcese orientiĝi tra la multaj rolantoj kaj diversaj epokoj, sed jam ĉe la dua legado ĉio iĝis kristale klara.

Ekzemple, en la sama ĉapitro, paragrafo finiĝas per "Ĉu la tagmanĝo baldaŭ pretos?", kaj la tuj sekvanta komencas "Ej, tagmanĝu jam!". Nu, gapo de 25 jaroj disigas la du frazojn. Tiu ĉi procedo fidele ripetigas tra la tuta verko. Iom post iom la leganto malkovras la rilatojn inter la diversaj personoj dise prezentitaj, kvazaŭ en detektiva romano. Tio postulas konstantan ĉeeston de la atento, sed multe kontribuas al la allogo de la rakonto. La medioj situas precipe en Glasgovo, Londono, nordfrancia kaj flandria militfrontoj, kaj akcesore en britaj flughavenoj kaj hospitaloj.

Francis plene disponas la necesan kapablon por kritike observi la homojn kaj ĝuste percepti la realan mondon. Al granda talento por rakonti, li aldonas tiun ne malpli grandan por motivi, karakterizi kaj viviĝi siajn rolulojn, kies agoj, paroloj, pensoj havas la aŭtenton de travivita sperto, eĉ se tio rezultas nur el la krea povo de la verkisto. Li priskribas la batalojn ĉe la riveroj Marne kaj Somme, ĉe Verdun, ne laŭ la perspektivo de generaloj, sed laŭ tiu multe pli realisma de la viro en la tranĉeoj. Kontraste, la priokupoj de la juna Ina antaŭ rendevuo kun soldato forpermese el la fronto impresas frivolaj:

"Naskite en ŝia kapo, la vestoproblemo kukolide ekonomopolis ĝin, senpartie elpuŝante ĉiujn aliajn pensojn, ĉu distrajn, ĉu devajn, kaj postulante ŝian tutan atenton je la malprofito de ŝiaj laboro kaj animtrankvilo."

En ĉiuj siaj portretoj de virinoj Francis montras penetran konon pri ilia koro kaj psikologio, kapton de plej fuĝaj nuancoj, kio tre maloftas en niaj originalaj romanoj. Li sukcesas sensigi al ni kun egala talento la problemojn kaj internajn konfliktojn de juna militrifuzanto, la entuziasmojn kaj elreviĝojn de ambicia ekaviadisto, la insidojn de amdeziro aŭ la preman sterilon de la soleco. Ni retrovas laŭ pli ampleksa skalo la kvalitojn de *La tuŝo de morto* kaj *La vidvino Pirsan* (aperintaj en la novelaro *Vitraro*): sobro, vira temperamento, lucido, ekvilibro, delikata ironio, kompatemo senigita de ĉia sentimentalismo, matura stilo. Ĉe Francis la pensulo neniam forgesigas la artiston. Lia lingvo, modere eksperimenta, estas vere ĝinda. Mi notis kelkajn intence nekonformismajn uzojn de la modo post kvazaŭ kaj interesajn formojn: jarojpasso, mortintojlisto, arbojsuproj, nervojnmurda.

Pro la valoro de la enhavo kaj la alta nivelo de la formo, mi opinias, ke tiu ĉi romano superas *Metropolitano*, *Vojaĝo al Kazohinio*, *Kiel akvo de l' rivero*, kaj mi ŝatus dividi kun multaj esperantistoj ĉion, kion ĝi donis al mi dum kaj post la legado.

Mendu ĉe UEA: 42,00 (por Nederlando 43,68) gld., plus sendokostoj 10 procentoj.

Ĉefe por inicitoj

Recenzas W. Manders (Nederlando):

Eseo pri Ido de Tazio Carlevaro. La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista, 1976. Studoj 5. 49p. Mimeo. 21cm.

Iam Ido konkuris kun Esperanto. Ĝiaj adeptoj laŭte proklamis la perfektecon kaj superecon de sia lingvo. La esperantistoj sin defendis kaj tiel estiĝis akraj polemikoj, sed ankaŭ ampleksa interlingvistika literaturo. Ido ankoraŭ ekzistas, sed jam longe ĝi estas sensignifa kompare kun Esperanto. El pure teoria vidpunkto ĝi tamen restas interesa studobjekto por lingvaj fakuloj. Tazio Carlevaro (svisa kuracisto) enkondukas sian studon konstatante ke nuntempe la lingvistika interesiĝo pri la planlingvoj ree kreskas, sed ke orientiĝo pri Ido fariĝas malfacila, ĉar aŭtentikaj dokumentoj estas apenaŭ alireblaj. Li volas objekte kaj senpartie informi pri la lingvo kaj faras tion komparante ĝin kun Esperanto kaj priskribante ĉiun detalon sen laŭdo aŭ kritiko.

La libro estas destinita por legantoj incitaj en la modernan lingvistikon. Por laikoj ĝiaj principoj kaj terminaro estas nekompreneblaj. Kvankam la studo estas ĉefe lingvistika, ĝi ankaŭ informas pri la historio de Ido, substrekante ke ne de Beaufront, sed Couturat estas ĝia vera aŭtoro.

Mendu ĉe UEA: 8,10 gld (por Nederlando 8,42) gld., plus sendokostoj 10%.

Kun nostalgia efiko

Recenzas Richard Schulz (FR Germanio):

Frithjof-sagao/Frithiofs saga (1825) de Esaias Tegnér (1782-1842). El la sveda trad. Wilhelm Th. Oeste. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1976. Plejado 2. 385p. 20cm. Dulingva eldono (la sveda kaj Esperanto).

Post la finna *Kalevala*, estona *Kalewipoeg* kaj post tiom da aliaj elstaraj klasikaj verkoj de la plej diversaj nacioj, nun aperis esperantigo ankaŭ de *Frithjof-sagao* de Esaias Tegnér (1782-1846). Tegnér sendube estas unu el la plej famaj svedaj beletraj aŭtoroj, apud Strindberg eble entute la plej fama. Lia *Frithjof-sagao* estas kvazaŭ la sveda nacia eposo. Ĝi renovigas, laŭ romantika sento, malnovajn nordajn legendojn, rakontas en lirike versitaj baladoj la farojn de pratempaj herooj. Sed, kaj tio kaŭzis la mirigan sukceson, kiun la eposo renkontis okaze de sia unua apero, Tegnér sciis kunligi kaj tiamaniere idealigi la krudan vivo-koncepton de la malnovaj norduloj kun la deviga etiko de platoneca kristanismo, pri kiu lin influis senteble la germana filozofo Schelling. *Frithjof-sagao* tre baldaŭ estis tradukita en preskaŭ ĉiujn eŭropajn lingvojn.

La libro konsistas el dudek kvar romanoj en tre variaj metrikaj kaj strofaj formoj, por kiuj W. Th. Oeste

trovis bonajn lingvajn solvojn, eĉ en malfacile tradukeblaj lokoj de la sveda teksto. Oni nepre devus laŭtlegi la versojn, por plene konsciiĝi pri ilia belsoneco kaj per tio ankaŭ pri la talento de la tradukinto.

La dulingva eldono tuj frapas la leganton, eĉ tiun, kiu ne posedas la svedan lingvon, per la egalforma aspekto de originalo kaj traduko. Oeste fidele redonis ne nur la multspecajn formojn de la originalo, sed ankaŭ ties spiriton kaj etoson. La tradukaĵo manifestas profunde engaĝiĝeman studadon de la multaspekta sveda teksto kaj de ĝia poeta lingvo. Ĝi atestas sindonan diligenton de la tradukinto.

La verko ofte rememorigas la stilon de la malnovaj islandaj poemoj. Ĝia apero en Esperantujo ĝuste nun estas tre salutinda. Ĉu ni ne travivas tempon, en kiu ni kaj speciale la gejunuloj nostalgie konsciiĝas, ke ni aktuale riskas perdi la senton pri certaj tradiciaj ideoj, kiuj tra jarcentoj apartenis al la plej altaj valoroj de la homaro? Jen legaĵo, kiu denove povas kontaktigi nin kun ili kaj kiu sendube apartenas al la perloj de la mondliteraturo.

Mendu ĉe UEA: 36,00 (por Nederlando 37,44) gld., plus sendokostoj 10 procentoj.

Foje incitaj bildoj

Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando):

De tempo al tempo de Giorgio Silfer. Kuopio/Milano: Librofako de *Literatura foiro*, 1977. 85p. 24cm.

”Kien iras la sentoj, la amo plej profunda, kiun neniu ekvidis kaj neniam iu aprezos? Ĉu ili estas gardeblaj, por ke tiom da eluzita energio iam estu utila?” Tiel demandas Silfer, aludante probablan sentimentalemon ĉe la plej multaj homoj, koncerne okazojn tiel individuajn, tiel intimajn, ke estas praktike neeble dividi ilin kun iu alia. Ankaŭ la poezio de Silfer grandparte konsistas el tiaj subjektivaj eldiroj, do en si mem prezentas nenian fremdecon; oni ja sentas sin iel nebule enhejme en la ĝenerala etoso de liaj versoj. Certe tio tamen ne signifas, ke io alpreninda estas atingita el la vidpunkto de la leganto: sentimentalismo, eĉ se pozitiva, emas maltrafi realigon de la objekteco necesa por definitiva akcepto. Efektive, ĉe Silfer mem io analoga konstateblas:

En la menso tiom da RE
al mi sufloras revon, sed —
ja post momento nur emanis veo.

(*Ĉu mi revidos vin, filino mia*)

Tia ŝvebpenda esprimado, kiu tiom karakterizas la poezion de Silfer, enhavas, laŭ mi, la esencan trajton de lia versarto, ie-ie eksaltetante per incitaj bildoj aŭ frazoj. ”Via silento persistis / kvazaŭ ĉirpo de cikad’ obstina” (*Vi ne skribis plu*) aŭ: ”... la kremo / de mia soleco / sub ĉi plafono katedrala” (*Via penso min agresis*).

En mallonga antaŭparolo la aŭtoro prezentas sian verkon, emfazante ĝian persondokumentecan karakteron.

La poemoj (entute 39, parte ital- kaj angla-lingvaj) ampleksas nur dujaran periodon de la versado de l' aŭtoro, tiel ke lia deziresprimo, ke la leganto vidu el tio lian, verŝajne poetan "evoluo", estas iom vanta; evoluo de poeto apenaŭ estas konstatebla, eĉ teorie, el tiel neabunda materialo. Ni tamen esperu, ke la evoluo de Silber kiel poeto iam estos konstatebla — sed tio povos okazi nur post pliaj verkoj, elkreskintaj for de tiu ĉi iom sendirekta komenco.

Mendu ĉe UEA: 11,70 (por Nederlando 12,17) gld., plus sendokostoj 10%.

Stilo por admiri

Recenzas W.A.M. van Heugten (Nederlando):

Ribela saĝo de Multatuli (pseŭd. de E.D. Dekker 1820-1887). El la nederl. trad. W.F. Pilger. Lelystad: Vulpo-Libro, 1977. 36p. 21cm. ISBN 90 70074 08 7.

De Multatuli, unu el la plej gravaj verkistoj de la nederlanda literaturo en la 19a jarcento, tradukiĝis jam

tekstoj en Esperanton en 1902. Ĉi tiu kolekto de paraboloj, rakontoj kaj aforismoj — el lia ĉefa romano *Max Havelaar* (1860) kaj liaj amleteroj kaj kolektitaj ideoj — prezentas sufiĉe fidindan kaj certe interesan bildon pri li. Precipe per siaj kernaj eldiroj li estis aŭtoro de "ribela saĝo".

Sendube pro siaj malagrablaj travivaĵoj, kiel oficisto en la iama Nederlanda Hindujo, kaj liaj postaj mizeroj, kiel preskaŭ senpana, neŝatata publicisto, Multatuli kritikis akre, mokante ne nur la socion nederlandan sed ankaŭ la homon, kiun li malestimis, opiniante lin ne sufiĉe konscia pri siaj spiritaĵoj kaj sociaj valoroj kaj kvalitoj. Eĉ sen konsenti pri religiaj konceptoj de Multatuli kaj trovante lian kritikon tro negativa, ne sufiĉe konstrua, oni devos admiri lian eksterordinaran esprim-povon kaj viglan stilon.

Precipe por la eksterlandaj gelegantoj, la tradukinto enkondukis ĉi tiun "tranĉaĵon" de Multatuli per mallonga skizo de lia vivo.

Mendu ĉe UEA: 4,20 (por Nederlando 4,37) gld., plus sendokostoj 10 procentoj.

Laste aperis...

De sezono al sezono (aŭtuno kaj vintro). Kompilis M. Miyamoto (1913-). Oosaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1977. 4 + 89p. 18cm. Larĝgama kolekto, kun verkoj de i.a. Peter Peneter, Maŭ Zedong, Kanguruo kaj E. Lanti. Prezo: 10,20 gld.

En iu nokto printempa, Joŝizumi Oozato (1926-). Miyazaki: La aŭtoro, 1977. 38p. Multobligita. 26cm. Originalaj noveletoj, fabeloj kaj pensoj. Prezo: 2,40 gld.

Eseo tra la kamparo, L. Tajpin (1917-). Seoul: Korea Esperanto-Asocio, 1977. 113p. 15cm. Originalaj kaj el la korea tradukitaj skizoj, eseoj (iuj politikaj), noveletoj kaj poemoj. Prezo: 3,90 gld.

Esperanto, eine lebendige Sprache; Einführungskurs nach der Methode Midgley, Heinz Dieter Hartig (1927-). Germana Esperanta Fervojista Asocio, 1977. 4+37p. 21cm. Prezo: 6,60 gld.

Esperanto vandaag 1. Antwerpen: La Verda Stelo, 1977. 24p. 21cm. Sep informaj artikoloj pri la lingva problemoj kaj ties kostoj, pri la Internacia Lingvo ktp. Nederlandlingva. Prezo: 1,20 gld.

Indigno de la servutuloj; Grupo da grandaj argilaj skulptaĵoj. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 90p. nenumeritaj. Bildolibro en la angla lingvo + 7p. de aparta Esperanta traduko. Fotoj, el kiuj kelkaj koloraj, de argila statuaro pri klaslukto en la iama tibeta socio. Prezo: 4,80 gld.

Justuloj, La (1950), Albert Camus (1913-1960). El la franca tradukis G. Lagrange (1928-). Paris: TESP, 1977. 5+75p. 25cm. Filozofia dramo kun historia fono. Prezo: 7,20 gld.

Kial en Ĉinio ne troviĝas inflacio, Peng Guanghi. El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 21+52p. Fotoj. 18cm. 4-Es-1329P. Prezo: 1,20 gld.

Kial mi estas kvakero, Albert Goodheir. Gloucester: Kvakera Esperantista Societo, 1977. 11p. 14 cm. Lampiro 1. Pri la rilato inter kvakerismo kaj la filozofio de Spinoza. Prezo: 0,90 gld.

Kontribuo de Kálmán Kalocsay al la Esperanta kulturo, La, Reinhard Haupenthal. Lelystad: Vulpo-Libro, 1978. 16p. 21cm. ISBN 90 70074 12 5. Studo, kun bibliografio, unue aperinta en *Heroldo de Esperanto*. Prezo: 1,80 gld.

Krucenigmoj kaj (desegnita) humuro en Esperanto, Stano Marček kaj Stano Markovič. Martin: Junulara Esperanto-Klubo, 1977. 2+53p. Ilus. 20cm. Prezo: 4,20 gld.

Malmalice, Johán Valano (pseŭd., 1931-). Pisa/Kuopio: La Nuova Frontiera/Literatura Foiro, 1977. 59p. 21cm. La unua poemaro de la aŭtoro, rimarkinde matura, kun kelkaj versteknikaj eksperimentoj. Prezento de H. Vatré. Prezo: 10,80 gld.

Post la kurso (1953), Wilhelm kaj Hans Wingen. Saarbrücken: Saarländischer Esperanto-Bund e.V., 1978 (fotorepreso). 99+54p. 20cm. Kun ŝlosilo. Prezo: 17,70 gld.

Slovaka antologio. Elektis Jozef Veľký. Redaktis M. Šturová-Seppová. El la slovakaj diversaj tradukintoj. Bratislava: Slovaka Pedagogia Eldonejo, 1977. 538p. Ilus. 20cm. Bindita. Preskaŭ 90 aŭtoroj, ekde la 9a jarcento ĝis nuntempo, en traduko de i.a. Jiří Kořínek, Miloš Lukáš kaj Eduard V. Tvarožek. Prezo: 18,00 gld.

Trigroŝa romano (1934), Bertolt Brecht (1898-1956). El la germana tradukis Karl Schulze. Gerlingen: Bleicher Verlag, 1977. 374p. 19cm. Bindita. ISBN 3-921097-34-7. Socikritika romano, bazita sur la pli frua *Trigroŝa opero*, pri almozuloj, ŝtelistoj kaj murdistoj, kies socio funkcias laŭ burĝa modelo. Prezo: 31,80 gld.

UEA kaj la neŭtraleco, Georges Salan (1903-). Nîmes: la aŭtoro, 1978. 11p. 22cm. Pri la "interna ideo" kaj ties rilato al la politika konvinko de unuopa esperantisto. Prezo: 5,40 gld.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto (1954), Hans Wingen. Saarbrücken: Saarländischer Esperanto-Bund e.V., 1978 (fotorepreso). 176p. 17cm. Kun leksikografia aldono. Prezo: 17,70 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldonoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.



LA URBO DE LA 34a TEJO-KONGRESO:

lama metropolo

MONTRIGOS, ke la junulara sekcio de UEA faris pli trefan elekton de la urbo por sia 34a Internacia Junulara Kongreso, ol estis la elekto de Varno por la 63a UK. Kompreneble, la kongresa urbo de TEJO neniel povus per siaj kapacitoj gastigi la mamutan aranĝon de la UK. Tamen, la urbo de la TEJO-kongreso trudiĝas kiel la plej vidinda el la bulgaraj allogaĵoj.

La mezepoka bulgara ĉefurbo Veliko Tarnovo estas pitoreske lokita sur la krutaj bordoj de la rivero Jantra, ĉe rando de Stara Planina (Malnova Montaro), konata ankaŭ sub la nomo Balkano. La arĝenta rubando de la rivero, dum jarmiloj, formas ĉi tie tra kalko-rokoj fabelan labirinton, en kiu elkreskis ne malpli fabela urbo.

Veliko Tarnovo estas fama ĉefe pro sia historio: longe antaŭ la fondiĝo de la bulgara ŝtato staris tie loĝlokoj de homoj. La romianoj komencis konstrui tie fortikaĵon, kiu multe suferis pro la invadoj. La nomo Tarnovo renkontiĝas nur ĉe la fino de la 12a jarcento, kiam la urbo fariĝis ĉefsidejo de la dua bulgara regno (1185-1393). Sur la altaĵoj Caravec, ĉirkaŭitaj per sistemo de fortikaj muroj, staris la reĝa palaco kaj la patriarka rezidejo. Malsupre, sur la bordo de la rivero, estas konservitaj kelkaj temploj de granda historia kaj arkitektura valoro.

Tiu mezepoka ĉefurbo estis ankaŭ grava kultura kaj ekonomia centro. Tie floradis la fama literatura skolo de Tarnovo, fondita de la patriarko Ertimi. Ĝi perdis sian gloron sub la kvin jarcentojn longa (1396-1878) turka juko, sed dum la 19a jarcento la komerco kaj metioj denove disvolviĝis. La riĉiĝintaj metiistoj kaj

komercistoj konstruis grandajn domojn, amfiteatre sur la krutaj bordoj de Jantra. Ilin oni ankoraŭ vidas en la kvartalo Varoŝa kaj en la strato Gurko.

Post la liberiĝo de Bulgario en 1878, en Veliko Tarnovo estis kunvokita parlamenta kunveno, kiu akceptis la unuan bulgaran konstitucion. Kvankam la urbo nun ne plu ludas tiel gravan rolon, kiel dum la mezepoko, Veliko Tarnovo plu disvolviĝas kiel administra kaj kleriga centro. Paralele kun la malnovaj metioj, ekfunkciis tie ankaŭ fabrikoj. En 1963 malfermiĝis Supera Pedagogia Instituto, kiu elkreskis en la universitaton "Cirilo kaj Metodo". En 1965, la bulgara registaro decidis, ke Veliko Tarnovo konserviĝu kaj disvolviĝu kiel historia kaj turisma urbo.



Veliko Tarnovo: Promeni en ĝiaj stratoj signifas ekskursi tra la riĉa historio de la bulgara popolo.

DU MULTNOMBRAJ RENKONTIĜOJ:

Epe antaŭ Jezolo

DU JUNULARAJ ARANĜOJ fine de marto kunvenigis preskaŭ 300 gejunulojn, nombro kiun kapablas superi nur iuj el la TEJO-kongresoj. En Jezolo (Italio), inter la 23a kaj 27a de marto okazis la 2a Junulara Internacia Festivalo kiu arigis siajn programerojn ĉirkaŭ la ĉeftemo "Junularo kaj teatro". Partoprenis cento da homoj, kiuj, krom en pluraj studgrupoj trakti la ĉeftemon, spektis la teatraĵon *Nevidebla Leonardo* de Norma Ŝerment, en plenumo de la Drama Sekcio de la Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo (Jugoslavio). Oni atendis ankaŭ la svisan teatran trupon "Vagabondoj", sed ĝi lastmomente decidis ne veni al Jezolo.

Ekskurso al la apuda Venecio okazis, kunsidis la Estraro de TEJO, kantis muzika bando el Romo.

Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) ĝojkriis pasintjare, kiam al ĝia renkontiĝo venis 87 homoj. Nun, inter la 24a kaj 27a de marto, la Junulara Paska Renkontiĝo en Epe allogis duoble pli da partoprenantoj — 175. Eble pro tio ke la TEJO-estraro iris al Jezolo, en Epe oni ne traktis tro da seriozaj temoj sed ĝuis ĉefe distrajn programerojn. Tamen, iom oni ankaŭ instruis al komencantoj, diskutis ambiciajn planojn de NEJ por la venonta jaro ktp. Ne mankis programero, kiu en la lastaj jaroj sukcesas elbatali lokon en preskaŭ ĉiuj junularaj aranĝoj en la Movado — popoldancoj. Tiu subita junulara interesiĝo pri la danca heredaĵo de la mondo restas iom kurioza kaj neklarigita fenomeno. Fine, en ambaŭ aranĝoj oni avaris pri komplimentoj al la organizintoj. Eble la nombroj simple superis la spertojn.



63a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Varno (Bulgario) 1978 07 29 – 08 05

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Bul.
Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia, Bulgario.

Aperis la Dua Bulteno. Demandojn pri ekskursoj, loĝado, antaŭ- kaj post-kongresaj aranĝoj kaj pri multaj aliaj kongresaj aferoj respondas la 44 paĝoj de la riĉe ilustrita Dua Oficiala Bulteno, kiun ricevas ĉiu aliĝinto al la 63a Universala Kongreso.

Loĝeblecoj: malkaraj ĝis luksaj. Ĉar malmultaj hotelitoj troviĝas en Varno mem, la Ŝtata Turisma Komitato rezervis por la kongresanoj 1200 litojn en privataj domoj. Unu lito, en dulita ĉambro, kostos en tiu loĝkategorio nur 12,50 gld. nokte. Eblas mendi liton ankaŭ en la urbocentra hotelo "Ĉerno More" (Nigra Maro), je tarifoj de 55,50 gld. (unu lito en dulita ĉambro, kun matenmanĝo) ĝis 94,25 gld. (unulita ĉambro, kun maten- kaj tag-manĝo). Mendeblaj estas ankaŭ litoj en la tre luksa, tre moderna hotelo "Varna", kiu malgraŭ sia nomo ne troviĝas en Varno mem, sed en la proksima apudstranda turisma komplekso Druĵba. La tarifo tie varias inter 96,25 kaj 148,75 gld. nokte.

Pli da karavanoj. Krom la karavanoj anoncitaj en la Dua Bulteno (belga, brita, franca, germana, japana, svisa kaj usona), nun anonciĝas grupvojaĝoj al Varno ankaŭ el Danlando kaj Svedio (Komunaj Esperanto-Kongresvojaĝoj, Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj, Danlando), el Finnlando (s-ro Pentti Järvinen, Lähdekorvenk. 4, SF-33820 Tampere 82) kaj el Jugoslavio (Esperanto-Societo, Tavčarjeva 2/II, YU-61000 Ljubljana).

Abunda ekskursprogramo. Okazos du duontagaj ekskursoj: la tradicia kongresurba rondveturo kaj vizito al la turismaj centroj Druĵba kaj Zlatni Pjasaci kaj la monaĥejo Alaĝa. Por la ekskursita tago prezentigos malfacila elekto inter kvar allogaj tuttagaj vojaĝoj, el kiuj unu celos la feriajn urbojn Konstanco kaj Mamajo en Rumanio. El du postkongresaj ekskursoj, unu iros aŭtobuse de Varno ĝis Sofio tra multaj ravaj lokoj, i.a. Veliko Tarnovo, montpinto Stoletov kaj Plovdivo; la alia postkongresa ekskurso direktigos al Istanbul en la najbara Turkio.

Montara Postkongreso. Inter la diversaj mendeblaj postkongresaj aranĝoj elstaras la Oficiala Postkongreso en Smoljano (inter la 5a kaj 11a de aŭgusto), urbo

en la pitoreska montara ĉeno Rodopi. En ĉi tiu regiono estas tre bone rimarkebla la kunmiksiĝo de popoloj kaj kulturoj, slavaj kaj islamaj, kiu rezultis el la plurjarcenta periodo, dum kiu Bulgario formis parton de la Otomana Imperio. Dum la Postkongreso inaŭguriĝos la nova Internacia Esperanto-Kursejo en Smoljano, kvinetaĝa moderna konstruaĵo kun propraj restoracio kaj loĝkapacito por ducent personoj, projektita kaj konstruita speciale por tiu ĉi celo. Tamen, bonvolu atenti, ke la Postkongreso akceptos nur 160 aliĝojn.

Por ĉiu lingva nivelo. Ĉiu parolanto de la Internacia Lingvo, de komencanto ĝis akademiano, trovos ion partoprenindan inter la klerigaj programoj de la 63a UK. Estos tie elementa kurso laŭ la Ĉe-metodo, progresiga kurso, konversaciaj rondoj, seminario por Ĉe-metodaj instruistoj kaj esperantologia konferenco.

Denove kongresa insigno. Kolektantoj de esperantaĵoj ĝojos ekscii, ke la kongresanoj en Varno, krom la kongresa karto, havos ankaŭ apartan insignon, kio iam estis regula praktiko de la Universalaj Kongresoj.

Turisma foiro. Vojaĝemaj esperantistoj kaj organizantoj de Esperantaj turismaj aranĝoj en 1978 kaj 1979 havos eblecon renkontiĝi dum trihora turisma "foiro", en la kadro de la 63a UK. Ekzistos tie ankaŭ ebleco disdoni informilojn kaj prospektojn pri tiaj aranĝoj. Organizantoj de la aranĝoj memoru, ke unue necesas sendi al la konstanta adreso de la Kongreso specimennon de ĉiu planata disdonaĵo.

Filmojn petu kaj proponu! Interesitaj landaj, regionaj aŭ lokaj Esperanto-organizaĵoj petu prunte de LKK (adreso ĉi-supre) filmojn pri la kongresa lando, por prezentado ĉe kunvenoj. Aliflanke, por la kongresa filmprezento LKK volonte ricevos proponojn pri novaj filmoj en Esperanto.

Ĉe-kursa korekto. En la mendilo por seminario pri la Ĉe-metodo aperas prezoj, kiuj ne akordiĝas kun tiuj sur p. 37 de la Dua Bulteno. La prezoj en la Dua Bulteno estas la ĝustaj: 50 gld. (ne 25,- gld.) por la seminario kaj 20,- gld. (ne 25,- gld.) por la kurslibro. Personoj el landoj, kiuj ne povas transpagi al Internacia Esperanto-Instituto en Nederlando, rajtas pagi la egalvaloron en bulgaraj levoj al la Loka Kongresa Komitato.

Ĉu superi Budapeŝton? Jam aliĝis pli ol 2100 kongresanoj, kaj estas tute probable, ke tiu nombro ĝis la fino duobliĝos. Tio signifas, ke la 63a UK povus fariĝi la dua plej amasa kongreso en la historio de la Movado. Tiun lokon nun okupas la 51a UK en Budapeŝto, en 1966, kun 3975 anoj. La unuan lokon okupas, kaj verŝajne ankoraŭ longe okupos, la 15a UK en Nurnbergo (1923) kun 4963 kongresanoj.



• Ĉeĥoslovakio: Ni ne tro ŝatas ĉi tiajn fotojn, kun steloj kaj Zamenhof-bildoj, sur kiuj oni plene pozas kaj atendas klikon aŭ klakon de la fotilo. Ili kutime iras en la fotoarkivon, antaŭ ol aperi en la revuo. Tamen, ĉi tiu foto de la klaso 2B en la gimnazio de la urbo Valašské Klobouky en Ĉeĥoslovakio longe rezistis enarkiviĝon pro la personeco de la centra figuro sur la foto, d-ro Josef Mana, gvidanto de ĉi tiu Esperanta rondeto. D-ro Mana instruas en la gimnazio la anglan, francan, latinan kaj rusan lingvojn, kiel devigajn studobjektojn, kaj gvidas rondetojn por la lernado de la araba lingvo kaj Esperanto. Inter liaj multaj verkoj estas ankaŭ ĉeĥa-ĉina kaj Esperanta-cigana (manuskripto) vortaroj. Ne miru, ĉar d-ro Mana dum sia vivo lernis ne malpli ol 180 lingvojn, dialektojn kaj lingvoprojektojn!

Brazilo

• Jam pli ol 30 jarojn Brazila Spiritisma Federacio regule okazigas Esperanto-kursojn. Ĉi-jare du novaj kursoj komenciĝis en la malnova sidejo, en Rio de Janeiro, kaj unu en la nova sidejo, en la ĉefurbo Brasília. Plia novaĵo pri la Federacio, kiu dum multaj jaroj havas tre ampleksan eldonan agadon en Esperanto, estas starigo de regula 15-minuta radio-programo en la Internacia Lingvo. Ĝi okazas ĉiudimanĉe je la 23a horo laŭ la Greniĉa Tempo, per la ondo-longo de 1400 kHz, en Radio Rio de Janeiro. La programo, kiun redaktas s-ro Affonso B.G. Soares, estas dediĉita al evangelio, spiritismo kaj Esperanto.

Germana DR

• En Leipzig, inter la 21a de januaro kaj 25a de februaro, okazis ekspozicio, aranĝita en dek vitrinoj de la urba informejo. La Esperanto-ekspozicion ne nur vidis multaj homoj, sed pri ĝi raportis ankaŭ du ĵurnaloj kaj Radio Leipzig.

Jugoslavio

• Financa subteno de aŭtoritatoj al Esperanto-kluboj en Jugoslavio dependas unuavice de la klubaj aktiveco kaj kontribuo al la kultura vivo de difinita urbo aŭ alia komun-

umo. Relative multaj lokaj Esperanto-grupoj ĝuas regule tian publikan apogon. Lastatempe la klubo en Split ricevis subvencion de 25 000 dinaroj (ĉ. 3 000 gld.), dum unu el la kluboj en Beograd enkasigis el simila fonto la egalvaloron de proksimume 4 000 guldenoj.

Kubo

• Esperantistoj, kiuj intencas partopreni la 11an Mondan Festivalon de la Junularo kaj Studentoj, meze de julio 1978 en Havano, anticipe skribu al: Kuba Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 314, Habana 1, Kubo.

FR Germanio

• En la kadro de la 11a Kultura Semajnfino, inter la 5a kaj 7a de majo 1978, en Blieskastel-Niederrüsch (Sarlando), akademiano Reto Rossetti faros prelegserion pri la temo "Enkonduko en la stilistikon de Esperanto". La serio konsistas el kvin prelegoj. La aranĝanto de la semajnfino estas Sarlanda Esperanto-Ligo.

Pakistano

• Venis al ni sciigo, ke komence de ĉi tiu jaro en la ĉefurbo Rawalpindi fondiĝis Pakistana Esperanto-Asocio, kies gvidanto estas s-ro Abdul Ghaffar Falak (vill: Hokraker, P.O. Gulehra Gali — Murree —, Dist. Rawalpindi, Pakistano). La informo estas des pli surpriza, ĉar oni kredis, ke en tiu azia lando vivas nur kelkaj izolaj esperantistoj. La nova asocio danke akceptos facilajn legaĵojn en Esperanto.

La necesa kompletigo?

La membrostatistiko de UEA (v. la paĝon 66 en la marta numero) atentigas, ke preskaŭ tri mil legantoj de nia revuo (kolektivaj kaj simplaj abonoj) ne nepre estas membroj de UEA. Strange! Ĉu temas pri la t.n. pasivaj esperantistoj, kiuj legas sed ne agas? Ĉi tiu revuo eĉ povas plaĉi al vi, tamen, la eldonaĵo kiu efektive estas unika kaj pri kiu UEA prave fieras, nomiĝas *Jarlibro* (ĉ. 350 p.). Vi eble ne vidis ĝin?! Ĝi ja venas nur al la membroj de UEA, kiuj ricevas ankaŭ *Katalogon de la Libroservo* (ĉ. 250p.), rajtas fariĝi delegitoj kaj utiligi la delegitajn servojn, voĉdonas, ĝuas rabatojn ĉe aliĝoj al la Universalaj Kongresoj ktp., ktp. Pro ĉio ĉi kaj ankaŭ pro transformiĝo de la pasiveco en aktivecon, la necesa kompletigo (kostas 22,00 gld. jare) nomiĝas:

Fariĝi membro de UEA!

Labortendaroj

- Internacia Esperantista Junulara Laborbrigado, kiun organizas la landa sekcio de TEJO en Jugoslavio, funkcios en la kadro de la plej granda ĉi-jara junulara laborarango en tiu lando. Temas pri la konstruado de la dua trako de la fervojo inter Šamac kaj Sarajevo en Bosnio, centre de la lando. La brigado, kies sola laborlingvo estos Esperanto, funkcios inter la 1-a kaj 31-a de aŭgusto 1978. Aliĝojn akceptas ĝis la fino de majo: JEJA (por brigado), Vase Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio. Estas notinde, ke la ĉefa organizanto de la granda laborarango (partoprenos ĉ. 27 000 gejunuloj) proponas por la aliaj laborbrigadoj ankaŭ kursojn de la Internacia Lingvo, kiujn prizorgos Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio.

Informado

- En la loka programo de Radio Santander (Hispanio) lastatempe okazas regulaj programoj pri la Internacia Lingvo. La programojn, kiuj kelkfoje daŭris eĉ plenan horon kaj estis ilustritaj per kantoj en Esperanto, aranĝas s-ro M. Gutierrez Aduriz.
- *Dominique*, periodaĵo de franca ŝparbanko, antaŭ nelonge aperigis ampleksan artikolon "La naskiĝo de Esperanto", verkita de C. de Neubourg. La periodaĵo estas senpage distribuata kaj havas tre grandan eldonkvanton.

Literaturo

- La 12-an de marto, en Milano (Italio), ĉe la sidejo de "Goethe Institut", okazis la ceremonio de la premiado en la literatura konkurso "Eŭropo". En la Esperanta branĉo (originala poezio) la premiojn gajnis: 1. Zora Heide (Danlando); 2. E. Järventausta (Finnlando); 3. J. Kořínek (Ĉeĥoslovakio). Mencioj iris al A. Bisogni (Italio) kaj J. Pióro (Pollando). La juĝkomisionon konsistigis: G. Azzi, T. Carlevaro, A. de' Giorgi, E. Wrangler kaj G. Ziegler.

Skoltoj

- La nova informa broŝuro de Skolta Esperanto-Ligo, *Vastaj horizontoj* (v. nian numeron de decembro pa-

sintjare, p. 210), jam aperis en la lingvoj: angla, franca, germana, hispana, japana, nederlanda kaj norvega. Baldaŭ aperos ankaŭ la kataluna eldono, dum la broŝuroj en la araba kaj sveda estas preparataj. Skolta Esperanto-Ligo (Postbus 433, 1500 EK Zaandam, Nederlando) volonte plenumas la teknikajn laborojn por eldoni la broŝuron ankaŭ en aliaj naciaj lingvoj. La jam aperintaj eldonoj estas mendeblaj ĉe SEL aŭ ĉe la Libroservo de UEA.

Politikaj partioj

- Sekve de la iniciato de s-ro John Rapley, Socialista Partio de Britio aperigis antaŭ nelonge sian manifeston en la Internacia Lingvo. En Aŭstrio, la Komunista Partio okupiĝis pri Esperanto en sia kongreso, fine de la pasinta jaro, kaj akceptis

rezolucion favore al la Internacia Lingvo, por kiu voĉdonis 223 delegitoj, dum nuraj 13 estis kontraŭ, kaj 10 delegitoj ne voĉdonis.

Instruado

- En Sarajevo (Jugoslavio), Esperanto-kursoj okazas en kvin elementaj lernejoj, por 150 gelernantoj. Oni antaŭvidas fondon de Esperanto-kluboj en ĉiuj kvin lernejoj.

Korespondado

- Nu, tio ĉi ne estas korespondpeta rubriko, sed kiam tia peto venas el Afganistano, lando kiu ĝis nun ne aperis sur la movada mondmapo, ni pretas cedi. Korespondi do deziras: D-ro H. Rashidi, Mazare-Sherif, Afganistano. Pri kio? Demandu mem.

Bibliotekoj

- Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno heredis riĉan interlingvistikan bibliotekon de prof. Eugen Wüster, forpasinta en la fino de marto 1977.

Persone



- Cseh: S-ro Andreo Cseh, aŭtoro de la fama rektmetoda kurso de Esperanto, kunfondinto kaj multjara redaktoro de "La praktiko", honora membro de UEA, komence de ĉi tiu jaro spertis nekutiman honoron en sia unua profesio, tiu de katolika pastro. En la Movado estis malmulte konate, ke antaŭ 43 jaroj la tiama episkopo de Harlemono (Nederlando) malpermesis al Cseh plu-praktiki sian pastran profesion, pro la fakto, ke Cseh en siaj Esperanto-kursoj kunvenigis katolikajn kaj protestantajn gelernantojn, kio kontraŭis la oficialan eklezian leĝaron. Informiĝinte pri la kazo Cseh, la nuna episkopo de Harlemono, per sia letero de la 4a de januaro, nuligis la decidon de sia antaŭulo kaj rehonoris pastron Andreo Cseh. Sekve, la 15-an de januaro 1978, en la paroĥo S. Antonio Abato, en Scheveningen (kie pastro Cseh nun loĝas), en jubilea meso, celebrata de la episkopo de Roterdamo, unu el la ses kuncelebrantaj pastroj estis Andreo Cseh (sidanta, maldekstre sur nia foto).

Nekrologoj

HERMANN TOBUSCH

En Villa Park apud Ĉikago, Usono, la 18an de decembro mortis Hermann Tobusch (1892-1977), iama delegito kaj fakdelegito de UEA en tiu loko. Li lernis Esperanton jam en Germanio de kie li elmigris post la Unua Mondmilito.

HANS WESTENBERGER


La 3an de februaro en Fulda (FR Germanio) mortis d-ro Hans Westenberg (1884-1978), honora prezidanto de la loka Esperanto-klubo, kies aktivulo li estis dum ses jardekoj. Li lernis Esperanton jam en 1905.

ĴAK ISAKOV

Tragike mortis en Tel-Avivo, Israelo, s-ro Ĵak Isakov (1910-1978), estrarano de la landa Esperanto-organizaĵo, fakdelegito de UEA.

MARIO PEI

La 2an de marto, en Glen Ridge, Usono, mortis prof. d-ro Mario A. Pei (1901-1978), mondkonata lingvisto, unu el la plej valoraj apogantoj de Esperanto en la fakaj lingvistikaj rondoj. En pluraj el siaj multnom-



braj verkoj (ekz. en *One Language for the World*) prof. Pei favore traktis Esperanton. Lia broŝuro *Wanted: a world language* (1969) ankoraŭ estas unu el la plej bonaj anglalingvaj

informiloj pri Esperanto; ĝi aperis ankaŭ en la nederlanda (du eldonoj). Prof. Pei estis membro de la redakta komitato de *La monda lingvo-problemo* (nun: *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*) ekde ties unua numero.

P. CASTELLVI DE HEIDER

En Caracas, Venezuelo, la 24an de decembro forpasis s-ino Palmira Castellvi de Heider (1894-1977), kataluna esperantistino, vidvino de germana esperantisto Xavier Heider. Ŝi lernis la lingvon jam en sia junaĝo kaj partoprenis i.a. la 5an UK en Barcelono (1909), restinte aktiva dum pli ol 60 jaroj.

ISRAEL ISRAELI

Multjara delegito en Haifa kaj antaŭa peranto de UEA, s-ro Israel Israeli (1910-1978) mortis en Tel-Avivo, kie li loĝis lastatempe kaj funkciis kiel vicdelegito. Li estis estrarano de Esperanto-Ligo en Israelo, aliĝinta landa asocio de UEA.

Oficiala Informilo

Numero 515

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

BRAZILO: I.A.A. Doretto. ITALIO: P. Tacconi. JAPANIO: Ĵun-iĉi Ŝibajama. USONO: R. Murphy.

SOCIETO ZAMENHOF 1977

BRAZ: 229 Elmo Pereira Nunes.

SOCIETO ZAMENHOF 1978

AŬSTRAL: 66 A. Einihovici. BELG: 67 Blanche Geers; 68 s-ino van Ginderen-Martens; 69 Vlara Peeters; 70 Jules Verstraeten. BRAZ: 71 F.S. Almada; 72 Marija Almada; 73 Carlos D. Dionisio; 74 Elvira Fontes; 75 Alvaro Rabelo. BRIT: 76 W.G. Atkinson; 77 C.M. Houghton; 78 G. B. Tordoff. FINNL: 79 Irja Klemla; 80 Harri Laine; 81 Liisi Oterma; 82 Annikki Rannisto; 83 Aarne Ratalahti; 84 Touko Tähtinen; 85 Harri Tuomola. FRANC: 86 J.P. Beau; 87 H. Dabezies. KAN: 88 Kirk Crockett; 89 M.C. Salt. NED: 90 H.M. Butter; 91 J. Flach; 92 H.C. Luyke; 93 G.H.M. Wulfers-Meddens. NOR: 94 Agneta Anjer; 95 Ludvig Anjer; 96 G. Bergrud. NOV-ZEL: 97 D.J. Langman. SVED: 98 P. Almén; 99 B. Bengtsson; 100

Ake Blomberg; 101 Esperanto-Societo de Gotenburgo; 102 Leif Holmlund; 103 Elna Jansson; 104 A. Johansson; 105 Tore Johansson; 106 B. Karlsson; 107 Henrik Karlsson; 108 D. Kullberg; 109 Ulla Luin; 110 Dagny Lundgren; 111 W. Malmsten; 112 Elly Persson; 113 Olle Persson; 114 Folke Pettersson; 115 Einar Rasmussen; 116 Eugen Rytenberg; 117 Isidor Södermann; 118 Sten Svenonius; 119 Jan-Olof Svensson. SVISL: 120 Otto Walder. US: 121 F.J. Belinfante; 122 Germaine Chomette; 123 Paul J. Burke; 124 Affonso Correa; 125 Mack X. Dougherty; 126 William J. Ford; 127 Thomas H. Goodman; 128 Ĝiĝi Harabaĝiu; 129 Peggy Linker; 130 Daniel L. Mason; 131 Rose Norlund; 132 James Parkerson; 133 Julie L. Regal; 134 George Rodenborn; 135 Robert A. Swenson; 136 Douglas B. Swett; 137 Catharine L. Schulze; 138 Ken Thomson; 139 Humphrey Tonkin; 140 L.A. Walther.

DONACIOJ 1978 (Gld.)

ĝis la 31a de januaro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: H. Deceuninck 2,30.

FONDAĴO CANUTO: Finnlando: I. Helsingius 112,00. FR Germanio: Felix Epstein 42,83; L. Wandscher 13,92; H. Wilke 58,90; E. Woller 48,19; W.Th. Oeste 19,28. Nederlando: F. Zeiler 55,00. Svedio: Ulla Luin 56,35. Sumo: 406,47.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Anonime 25,00.

ĜENERALA KASO: Belgio: S. De Weerd 20,80. Finnlando: L. Ahto 103,04. FR Germanio: A. Bepperling 12,85; G. Ritterspach 8,56; H. Meyer 5,35; W. Heinrich 216,50; M. Klünder 108,25. Japanio: T. Nisio 7,50. Kanado: B. Salt 30,82. Nederlando: Teo Jung 45,00; F.H. Kat 20,00. Sumo: 578,67.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO: 1 G. Becker, FR Germanio. 2 G.W. J. Duivis, Nederlando. 3 Rolf Nordström, Svedio. 4 Peter Zlatnar, Jugoslavio. 5 M. Meywes, Nederlando. 6 Sergio Martina, Italio. 7 M. Landmark, Norvegio. 8 Ludvig Anjer, Norvegio. 9 D.J. Langman, Nov-Zelando. 10 Renée Triolle, Francio. UNESKO-KAMPANJO: FR Germanio: Peter Weide 92,50.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

ekzameno E

RESPONDO 18

(pri la demando vidu nian martan numeron, p.68)

1. Paŭlo Nylén (1870-1958), krom siaj taskoj kiel raportisto pri parlamento kaj aktualaĵoj, dum 15 jaroj ĉefredaktis la organon de la sveda polico. Per la helpo de Esperanto li akiris informojn pri la organizado kaj laborkondiĉoj de policistoj en aliaj landoj.

2. En la romano *Anni kaj Montmartre*, Anni Laufer sukcesas savi sian protektanton, Enrique aŭ Rik Esbirro, kiu estas arestota, kiam ŝi tranĉas en la brakon de la policisto per pikarmilo. Poste Rik senkonsciigas la policiston kaj la paro forkuras. Raymond Schwartz (1894-1973) verkis la romanon, kiu aperis en 1930 kaj reeldoniĝis en 1974.

3. Edmond Privat (1889-1962), estante nur 22-jara, veturis al la cara Rusujo por prelegi ĉe la Tolstoja Societo en Moskvo. Li havis invitojn prelegi ankaŭ en Peterburgo, Kievo kaj Ĥarkovo. Krome, li deziris pledi antaŭ la rusa ĉefministro por la liberigo de A. Postnikov, esperantisto arestita pro spionado.

4. En *Kredus min, sinjorino!*, Cezaro Rossetti (1901-1950) priskribas kiel lia kunlaborantino, Madame Zila, kiu vere ne kapablas diveni pensojn, elpensas la aferon de la ŝtelo de mono por aldoni iom da spico al la programo. Por eviti embarasan situacion, Madame Zila kaj Rossetti devas forlasi la urbon antaŭ la pridemandado de la polico. La romano estis dufoje eldonita, en 1950 kaj 1974.

5. En la urbo Székesfehérvár, Hungarujo, la Hungaria Esperantista Societo Laborista ne povis organizi sian kurson pro la interveno de la polico. La poliestro poste modifis sian kalumnion dirante, ke "laboristoj ne lernu lingvon, kiun la laboradantoj ne komprenas." Aleksandro Giesswein, katolika prelato, parlamentano kaj prezidanto de la

Hungarlanda Esperanto-Societo, pritraktis la aferon en la parlamento.

6. La novelo *Kancero de animo*, verkita de Julio Baghy (1891-1967), temas pri la tragika vivhistorio de du viroj, kiuj malfacile kapablas elteni la solecan vivon sen la edzinoj, kiuj jam ne amas ilin. Ili ĉesigas siajn suferojn per memmortigo. La novelo aperas en la kolekto *Koloroj*, eldonita en Varsovio en 1960.

7. Aŭgusto Marich (1883-1955), unue poŝtoficisto, poste policisto, estis sekretario de la unua hungara Esperanto-grupo en Budapeŝto, fondita en 1901. Li redaktis plurajn Esperanto-gazetojn, inter kiuj estas *La verda standardo*, *Polica revuo*, *La poŝtisto* kaj *La fervojisto*. Post la unua mondmilito li klopodis krei internacian organizaĵon de esperantistaj policistoj.

8. Ili aktoras en la krim-filmo *Angoroj* (ĉi tie sceno el ĝi), la unua fikcia



filmo plene en Esperanto. J.L. Mahé produktis ĝin en Parizo en 1964.

9. Pri la proleta Esperanto-movado estas la titolo de 284-paĝa dokumento kompilita de japana prokuroro Zirô Takeuti. Krom informoj pri proletaj Esperanto-organizaĵoj, la libro enhavas eltiraĵojn de Esperanto-revuoj kaj verkoj de Edmond Privat, Ernest Drezen kaj E.F. Spiridoviĉ. Post la eldono de "la plej sekreta libro pri Esperanto", la japana polico komencis pli atente observi ĉiujn esperantistojn, ne nur proletajn.

10. En *Ĉu vi kuiras ĉine?* (1976), detektivo Jano Karal esploras la motivojn de la murdo de Paŭlo Jorli, 23-jara murfarbisto. La aŭtoro de la romano estas Johán Valano, pseŭdo-

nimo de Claude Piron (1931 -), belgo loĝanta en Svislando.

DEMANDO 19

(la respondo aperos en nia maja numero)

Komence de marto oni festas en pluraj landoj la Internacian Tagon de la Virino. Iom malfrue, nia rubriko omaĝe kontribuas al tiu festo per demando pri dek virinoj, kiuj ludis diversajn gravajn rolojn en la Esperanto-movado. Ĉu vi scias, kiuj ili estas?

1. La edzino de universitata profesoro en Tübingen esperantistiĝis en 1903, kiam ŝi estis 60-jara. Ŝi fondi Esperanto-literaturan asocion kaj en 1908 estis sekretariino de la 4a UK en Dresdeno. La postan jaron ŝi gajnis la unuan premion de la literatura turniro "Floraj Ludoj" en la 5. Universala Kongreso en Barcelono.

2. Franca komercistino el Marsejlo lernis Esperanton en 1903 kaj fariĝis membro de la Lingva Komitato en 1910. Krom multnombraj gazetarikoloj en Esperanto kaj en la franca, ŝi verkis romantikajn teatraĵojn sub la pseŭdonimo Roksano. Ŝiaj verkoj temas ĉefe pri virinaj problemoj en la socio.

3. Riĉa virino el Usono, la edzino de la usona ambasadoro en Belgio, esperantistiĝis en 1920-aj jaroj kaj fariĝis dumviva membro de UEA. Dank' al ŝia malavareco, estis eldonitaj en 1929 du nemalhaveblaj konsultlibroj en Esperanto: *Bibliografio de internacia lingvo* de Petro E. Stojan kaj *Originala verkaro de L.L. Zamenhof*, redaktita de d-ro J. Dietterle.

4. Okaze de la eksplodo de la unua mondmilito en 1914, d-ro Zamenhof perdis kontakton kun sia frato Felikso, dumvojaĝe restinta en Germanio, kaj sia filino Sofia, laborantino kiel kuracistino en Ĥarkovo, Ruslando. Li turnis sin al esperantistino en neŭtrala nordeŭropa lando kaj petis ŝin helpi lin ekscii la sorton de siaj familianoj. Kiu estis tiu virino?

5. Virino de aristokrata brita familio kiu aktivis en la movado por virina emancipado kaj poste okupiĝis pri la problemoj de la laboristaro, fariĝis klasbatalema maldekstrulino.

Ekde la 1-a de aprilo 1978 ŝanĝiĝas la elsendohoro de la Esperantaj programoj de RADIO ZAGREB. Ili nun okazos MARDE (anstataŭ vendrede) je la 23h45, laŭ la mezeŭropa tempo. La ondolongo restas la sama (264m aŭ 1163 kHz).

erninte Esperanton post la unua mondmilito, ŝi aliĝis al internacia porista Esperanto-organizaĵo kaj dediĉe laboris kun la fondinto de la organizaĵo.

Ĉeĥa esperantista pioniro lernis lingvon en 1907 kaj dediĉis sian tian vivon al Esperanto, aktivante la instrua, informada kaj literaturkampoj. En 1909 ŝi aranĝis esperanto-ekspozicion kaj fondis esperanto-unuiĝon. La sekvan jaron fariĝis sekretariino de la ĉeĥa rina Esperanto-movado kaj ankaŭ delegitino de UEA. Dum la 13a UK en Prago (1921), ŝi oficis kiel membro de la Loka Kongresa Komitato. Ŝi estis honora membro de UEA.

La edzino de fama nederlanda esperantisto lernis Esperanton en 1909 kaj aktivis multflanke en la nederlanda E-movado. Ŝi invitis la 2an Universalan Kongreson al Prago en 1920. Kune kun Andreo Cseh ŝi organizis en 1930 la Internacian Ĉe-Instituton de Esperanto. Por disvastigi la ideon de mondfederis-



mo inter esperantistoj, ŝi kaj Andreo Cseh fondis la Universalan Ligon en 1942 kaj eldonis la revuon *La praktiko*, fonditan jam en 1932. Ankaŭ ŝi estis honora membro de UEA.

8. Virino, kiu estis radiotelegrafistino, esperantistiĝis en 1913 en Tallinn. Ŝi kunlaboris en la ĉefaj beletraj periodaĵoj aperintaj dum la

periodo antaŭ kaj post la unua mondmilito. Krom verki originalan poezion en Esperanto, ŝi abunde tradukis ne nur el sia gepatra lingvo, la estona, sed ankaŭ el la germana kaj rusa lingvoj. Ŝi estas honora membro de UEA.

9. Polino, kiu naskiĝis en Esperanton parolanta familio, studis juron ĉe la Universitato de Varsovio, sed post diplomiĝo dediĉis sin ekskluzive al Esperanto. Ŝi faris informad-celajn vojaĝojn kaj gvidis multajn kursojn de Esperanto uzante la Ĉe-metodon. Ŝi estis la plej fama esperantistino en la bahaa religia movado.

10. Unu el la du nuntempaj virinaj membroj de la Akademio de Esperanto lernis la lingvon en 1949. Profesie ŝi estis instruistino, direktoro de porinstrua altlernejo kaj lektorino pri la angla lingvo kaj literaturo. Ŝi verkas originale en preskaŭ ĉiuj ĝenroj: poezio, noveloj, teatraĵoj, eseoj kaj biografio. En la Belartaj Konkursoj de UEA ŝi gajnis la plej multajn premiojn — entute 21.

Anoncetoj

ARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. 1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

-ro F.W. Rentmeister, antaŭa ĉefdelegito de UEA por Aŭstrio, havas novan adreson: C. Patzenhofergasse 1, A-7011 Siegendorf-Burgenland, Aŭstrio.

0-jara knabino volas korespondi bildkarte: Tanja Deacove, R.R.4, Perth, Ontario, K7H 3C6 Kanado.

LE HAVRE, vojkruciĝo de la popoloj", temo de la festado de nia urbo dum junio. La Esperanto-sekcio de la Junuldomo invitas vin partopreni amase: sendu mesaĝon sur poŝtkarto aŭ letero en via nacia lingvo, kun Esperanto-traduko. Vi ricevos raporton post la Festo. M.J.C., 2, avenue Foch, F-76600 Le Havre, Francio.

Naturistoj/Nudistoj! Aliĝu al INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)! Bonvolu peti informojn ĉe: Helmut Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Serĉas informojn pri konstanta kalendaro laŭ Comte aŭ alia: S-ro von Blottnitz, Marcolaan 8, Florida-Glen 1710, Sud-Afriko.

INTERNACIA POPOLDANCA FESTIVALO, SCHOTEN, BELGIO: Eksterlandaj popoldancantoj-esperantistoj, ĉu iu el vi partoprenos ĉi tiun Festivalon dum julio 1978? Bonvolu kontakti (kiel eble plej baldaŭ) la Antverpenan Esperanto-Grupon: S-ino Van der Sypt, Schotenhofdreef 24, B-2120 Schoten, Belgio.

Kanada knabino 9-jara deziras interŝanĝi bildkartojn: Christa Deacove, R.R.4, Perth, Ont., K7H 3C6 Kanado.

Gejunuloj 15–21-jaraj volonte akceptos korespondproponojn: Junulara Kulturdomo, str. Ogarua 56, PL-80-826 Gdańsk, Pollando.

Commonwealth Games: Esperantistoj, kiuj venos al Edmontono, en somero, por la sporta aranĝo, bonvolu skribi al: Robyn Buchan, 9635-77 Street, Edmonton, Alberta, T6C 2M8 Kanado.

Librojn kaj broŝurojn elĉerpitajn proponas al vi je favoraj prezoj, el sia kolekto de duoblaĵoj, la Biblioteko Hodler de UEA. Petu liston kaj kondiĉojn ĉe:

Biblioteko Hodler, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Aparta ornamajo: poŝ-sunhorloĝoj sen kompasoj, laŭ historiaj modeloj. Bonvolu peti prospekton ĉe: Wolfgang Zerah, Lindenweg 18, D-3550 Marburg, FR Germanio.

21-jara studento serĉas letergeamikojn en la tuta Ameriko: Jacques Lindau, 3, rue Pershing, F-57100 Thionville, Francio.

Kun danaj kaj norvegaj gejunuloj ŝatus korespondi: Mas'ud Kešavarz, Rahbar, 424 Moshirifard Lane (Rahpeyma St.), Tehran, Irano.

Zamenhof-letero al J.M. Schleyer el 1887 vendebla. Sendu prezoferton al: SEL, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

300 gastigejoj

pere de la Pasporta Servo

Tiom da esperantistoj en pli ol 40 landoj pretos senpage gastigi vin. Listigas 300 adresojn la ĵus aperinta "Listo de gastigantoj 1978" de la Pasporta Servo de TEJO. Aĉetante tiun libron (15 francaj frankoj aŭ 10 irpk.) oni aŭtomate aliĝas al la servo. Mendoj kaj detaloj ĉe: J.-M. Cash, 9, rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts-le-Roi, Francio. Pĉk. 25 426-58 Paris.

Pensu pri beleco

uzante sur viaj korespondaĵoj la allogan trikoloran glumarkon! Cent markoj kostas 8,25 (por Nederl. 9,60) gld., kio inkluzivas la sendokostojn.



Mendu ĉe via landa libroservo aŭ ĉe la Libroservo de UEA, Rotterdam.

Johán Valano aŭtoro de la jaro 1976

malmalice

originala poemkolekto

60 paĝoj, 21 cm.
3960 liroj, inkluzive sendokostoj

distribuas:

LA NUOVA FRONTIERA ELDONEJO
VIA BRUNO, 8 – 56100 PISA – ITALUJO

eldonis: literatura foiro kaj la nuova frontiera

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ (4a sesio) UNIVERSITATO DE LIEĜO (BELGIO) 06 – 27 de aŭgusto 1978

SUK78

Petu pliajn informojn kaj aliĝilon ĉe:
SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ,
Boîte Postale 9,
B-4000 Liège X,
Belgio.

SEKCIO A: ASTRONOMIO

- 1-a semajno: H.M. Maitzen (Aŭstrio): Stela magnetismo
- 2-a semajno: H.M. Maitzen (Aŭstrio): La strukturo kaj dinamiko de nia galaksio
- 3-a semajno: H.M. Maitzen (Aŭstrio): Modernaj observoteknikoj en la astronomio

SEKCIO P: PSIKOLOGIO

- 1-a semajno: C. Piron (Svislando): Strukturiĝo de la personeco
- 2-a semajno: M. Landmark (Norvegio): Enkonduko en la socialan, emocian kaj intelektan evoluon
- 3-a semajno: J. Lieberman (Usono): Seksedukado kaj psikoterapio: integriĝo je mensa sanigo

SEKCIO IL: INTERNACIA LITERATURO

- 1-a semajno: V. Benczik (Hungario): Verkado kaj legado de beletra en fremda lingvo
- 2-a semajno: G. Silfer (Finnlando): Stilistiko kaj literatura kritiko
- 3-a semajno: G. Silfer (Finnlando): Sciencfikcio: internacia ĝenro por internacia lingvo

Ĉiu semajna kurso ampleksas 12 lekciojn de po 45 minutoj, kiuj okazas de lundo ĝis vendredo, ĉefe matene. Sabato estas dediĉita al ekzamenoj, ekskursoj, ktp. Studvizitoj estas antaŭviditaj.

Aliĝo: La horaro estas tiel aranĝita, ke eblas aliĝi al sekcio IL kaj samtempe al sekcio A aŭ al sekcio P. Krome, ĉiu kalendara semajno estas en si mem kompleta unuo. Oni do havas kvin aliĝeblecojn (sekcio A, sekcio P, sekcio IL, sekcioj A kaj IL, sekcioj P kaj IL) dum unu, du aŭ tri semajnoj.

Kromprogramo: Ekskursoj, vizitoj, film-vesperoj, sportado, kulturaj aranĝoj, perfektiga Esperanto-kurso gvidata de J.P. Vilhelm (Francio), ktp.

Kotizoj: Programkostoj (unu sekcio dum unu semajno): 900 bf; studentoj 650 bf; Restadkostoj (modifeblaj) (semajne): ĉ. 2000 bf; Perfektiga Esperanto-kurso (semajne): 400 bf; Taga kotizo por vizitantoj (sen restado): 200 bf.

Stipendioj: Estas disponeblaj kelkaj stipendioj. Interesuloj sin turnu al la SUK-adreso.

Faldfolioj: Krom faldfolio kun ĝeneralaj informoj pri la sesio kaj aliĝilo, disponeblas dua faldfolio en kiu ĉiu kurso estas detale priskribita. Petu la du faldfoliojn ĉe la SUK-adreso.

Venu al

Internacia Teatra Renkontiĝo

(sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio)

en Pollando, inter la 19a de majo kaj 4a de junio 1978


Partoprenos teatraj trupoj el Bulgario, Francio, Pollando, Soveta Unio kaj verŝajne aliaj landoj.

Via aliĝo al la oficiala karavano de UEA kaj la pola vojaĝagentejo Juventur inkluzivas:

- kulturen programon en Mielno,
- la Teatron Renkontiĝon en Gdansk,
- pliajn spektaklojn en Bidgoŝo,
- aŭtobusan transporton ekde kaj ree al Berlino,
- ĉiujn restadkoston, inkluzive de manĝoj.


Ĉion ĉi kontraŭ nuraj 450,00 guldenoj!

Ĉiuj karavananoj ricevos liberigon de la deviga monŝanĝo en Pollando. Nur kvardek lokoj haveblaj! Aliĝu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, kun indiko "Teatra Renkontiĝo" sur la pagilo. Limdato por aliĝo: 20a de aprilo 1978.



Dum preskaŭ duonjarcento, la originala poezio de Kalocsay reprezentigis esence nur per *Streĉita kordo*. Nun, fine, *Izolo* prenas sian lokon apud ĝi. La unua eldono de *Izolo* fariĝis praktike kvineksemplera, pro la militeksplodo en 1939. Ĉi tiu fotorepreso estas farita laŭ unu el tiuj raraj originalaj ekzempleroj.

Eldonis UEA, Rotterdam, 1977. 77p. 18cm. Bindita, kun ŝirmkovrilo. ISBN 92 9017 020 4. Prezo: 16,50 (por Ned. 17,16) gld. + afranko 10%.



Ĉi tiu ornamaĵo konsistas el la vorto "Muhammad" (kvarfoje) en la skribo "Kū fi". Ĝi mem sufiĉe diras pri la ĉefa enhavo de la volumo, en kiu la tradukinto de LA NOBLA KORANO



prezentas la vivon de la centra figuro de Islamo kaj ĝenerale klopodas proksimigi al ni la islamajn penson kaj kulturon. Eldonis: TK, Antverpeno, 1978. 362p. 21cm. ISBN 90 6336 003 7. Prezo: 33,00 (por Ned. 34,32) gld., plus 10% sendokostoj. La ĉefa distribuejo: UEA.

JE LA FLANKO DE LA PROFETO de Italo Chiussi estas la 12a volumo en la prestiĝa eldonserio ORIENTO-OKCIDENTO, sub aŭspicio de UEA, en la granda projekto de Unesko por la reciproka aprezado de la kulturoj de la Oriento kaj Okcidento. Jam elĉerpiĝis pluraj el la verkoj antaŭe aperintaj en la serio, kio estas bona rekomendo ankaŭ por ĉi tiu valorajo, kiu al la internacia legantaro klopodas deĉifri la mondon de Islamo. La verko de Chiussi estus fierajo ankaŭ por ĉiu nacia kulturo.

italo
chiussi

je
la flanko
de
la profeto